Project Gutenberg's La Murdoj de Kadavrejo-Strato, by Edgar Allan Poe

This eBook is for the use of anyone anywhere at no cost and with almost no restrictions whatsoever. You may copy it, give it away or re-use it under the terms of the Project Gutenberg License included with this eBook or online at www.gutenberg.org

Title: La Murdoj de Kadavrejo-Strato
The Murders in the Rue Morgue

Author: Edgar Allan Poe

Translator: Edwin Grobe

Release Date: May 6, 2006 [EBook #18326]

Language: Esperanto

Character set encoding: UTF-8

*** START OF THIS PROJECT GUTENBERG EBOOK LA MURDOJ DE KADAVREJO-STRATO ***

Produced by Robert L. Read, William Patterson and the Online Distributed Proofreading Team at http://www.pgdp.net

KLASIKAJ USONAJ NOVELOJ

EDGAR ALLAN POE
(1809-1849)

# LA MURDOJ DE KADAVREJO-STRATO

Esperantigis
EDWIN GROBE

1998
Eldonejo-Arizona-Stelo
1620 North Sunset Drive
Tempe, Arizona 85281-1550
Usono

Edgar Allan Poe
"LA MURDOJ DE KADAVREJO-STRATO"
Unua Eldono, Aŭgusto, 1998

Origina Anglalingva Titolo
"THE MURDERS IN THE RUE MORGUE"

# LA MURDOJ DE KADAVREJO-STRATO

La mensaj kvalitoj nomiĝantaj analizaj nur malmulte analizeblas en si. Ni taksas ilin ĉefe laŭ iliaj efikoj. Ni scias pri ili, inter aliaj informaĵoj, ke por posedanto posedanta ilin preterabunde, ili estas ĉiam fonto de la plej vigla ĝojo. Same kiel la fortikulo festegas sian fizikan potencon, ĝuante tiujn ekzercojn kiuj aktivigas siajn muskolojn, feliĉigas la analiziston tiu intelekta agado kiu _malimplikas_. Li spertas plezuron plenumante eĉ la plej bagatelajn taskojn utiligantajn lian talenton. Li ŝatas enigmojn, rebusojn, hieroglifojn, elmontrante en sia solvo de ĉiu, gradon da _sagaceco_ kiu al la ordinara prikonscio ŝajnas preternatura. Liaj rezultoj, efektivigite de la animo kaj esenco mem de metodo, havas la tutan aspekton, verdire, de intuicio.

La solvokapablon multe vigligas eble matematika studado kaj precipe tiu plej alta branĉo nomiĝanta, maltaŭge kaj, kvazaŭ superlative, ununure pro siaj retroiraj funkcioj: analizo. Tamen kalkuli ne estas en si analizi. Ŝakludisto, ekzemple, kalkulas sed ne analizas. Sekvas ke ŝakludado, rilate al siaj efikoj sur mensan karakteron, ege miskompreniĝas. Mi ne verkas traktaton nun, sed simple antaŭparolas per hazarde elektitaj perceptaĵoj iom strangan rakonton. Tial mi elprofitos la okazon deklarante ke la superajn potencojn de la kontemplema intelekto pli rigore kaj pli utile laborigas malpompa matĉo
de damludo ol ĉiuj komplikaj ŝakludaj frivolaĵoj.

Ĉe ŝakludo, kie la pecoj havas malsamajn kaj bizarajn movojn, kun diversaj kaj ŝanĝantaj valoroj, oni erare taksas profunda (kaj ne malkutima eraro ĝi estas) tion kio estas nur kompleksa. La _atento_ ĉi-tie potence alvokiĝas. Se ĝi malvigliĝas nur momenteton, preteratentaĵo okazas, kaj rezultas vundo aŭ malvenko. Pro tio ke la eblaj movoj estas ne nur multnombraj sed ankaŭ envolvitaj, pli multnombriĝas la ebloj ke okazu tiaj preteratentaĵoj. Naŭ fojojn el dek estas la plej koncentrema kaj ne la plej akrapensa ludanto kiu venkas.

Ĉe damludo tamen, kie la movoj estas unikaj kaj havas nur malmultan malsamecon, malmultnombriĝas la ebloj preteratenti kaj la atentokapablo
havas nur ioman utilon. Tial, se iu ajn ludanto pridisponas avantaĝojn,
tiujn li gajnas pere de supera sagaceco. Por iom konkretigi la temon, ni
imagu damlud-matĉon en kiu restas nur kvar damoj kaj kie, kompreneble,
ni ne rajtas atendi preteratentaĵon. Memklare estas ke ĉi-tie venko efektiviĝas (ni supozu la ludantojn egaltalentaj) nur pere de bonege konceptita movo rezultigita per forta mensolaboro. Maldisponante kutimajn rimedojn, la analizisto sin transĵetas en la spiriton de sia kontraŭstaranto, sin identigas kun tiulasta kaj tiumaniere ne malofte prikonscias ekrigarde la ununurajn rimedojn (foje eĉ absurde facilajn)
per kiuj delogi en eraron aŭ hastigi en miskalkulon.

Jam de longa tempo oni konscias pri la forta influo kiun vistoludo

alportas al la homa kalkulpovo. Homoj havantaj la plej altkvalitan intelekton laŭraporte distriĝas pretermezure ĝin ludante dum ili sin senigas kontente je ŝakludado, taksante tiulastan frivola. Preterdube, ekzistas nenia samspecaĵo povanta tiom forte laborigi la analizkapablon.

Povas esti ke la plej bona ŝakludanto de la tuta Kristanlandaro estas nur la plej bona ŝakludanto. Sed kapablo pri vistoludado ampleksas kapablon sukcesi pri ĉiuj tiuj pli gravaj entreprenoj en kiuj menso kontraŭbatalas menson.

Kiam mi diras "kapablo" mi voldiras tiun perfektan ludlertecon inkluzivantan komprenon pri _ĉiuj_ fontoj el kiuj laŭleĝaj avantaĝoj haveblas. Tiuj estas krom multnombraj, ankaŭ multformaj kaj ripozas ofte en pensadkaŝejoj nepre neatingeblaj al ordinara komprenado. Observi atente estas memori klardetale. Kaj ĝis tiu punkto koncentrema
ŝakludanto povas bone sukcesi ludante viston ĉar la reguloj de Hojlo (bazitaj sur la nura meĥanismo de la ludo) estas sufiĉe kaj ĝenerale kompreneblaj. Tial disponi pri retenema memoro kaj agi "laŭlibre" estas
la nepraj kvalitoj kiuj konsistigas, laŭ ĝenerala opiniaro, bonan ludadon.

Sed estas pri aferoj situantaj eksterlime de nuraj reguloj ke elmontriĝas la lerteco de la analizisto. Li faras, silente, aregon da observaĵoj kaj induktoj. Same agas, eble, liaj kunludantoj, sed la diferenco en la amplekso de la akiritaj informaĵoj sidas ne tiom en la
valideco de la induktado kiel en la kvalito de la observado. La bezonata
scio estas: _kion_ observi? Nia ludanto nepre nenie sin limigas. Aldone,
kvankam la ludo estas la celobjekto, li ne malkonsentas fari induktojn
bazitajn sur eksterlude situantaj indicoj. Li kontrolas la mienon de sia partnero, ĝin komparante kun tiu de ĉiu kontraŭstaranto. Li konsideras la manieron en kiu ĉiu ludanto aranĝas enmane la kartojn, ofte kalkulante atuton post atuto, honoraĵon post honoraĵo, laŭ la rigardoj kiujn la rigardantoj direktas sur ilin. Li priatentas ĉiun mienŝanĝon dum antaŭenevoluas la ludado, amasigante provizon da pensmaterialo bazitan sur la diferencoj de sentosignaloj: certeco, surprizo, triumfo, ĉagreno. Laŭ la maniero enmanigi prenon li taksas ĉu la enmaniginto kapablas sukcesigi ceteran en la sama emblemo. Li rekonas karton ruzluditan per la maniero en kiu la kontraŭstaranto ĝin surtablenigas. Hazarda aŭ senatenta vorto; senintenca faligo aŭ renverso de karto kaj la kuniranta anksieco aŭ senzorgo de la klopodo tion kaŝi; la komptado de la prenoj kun ilia aranĝordo; embaraso, hezitado, avideco aŭ timego—ĉiuj havigas al lia ŝajne intuicia perceptado indicojn pri la vera aferstato. Je la fino de la du-tri unuaj
ludrondoj li jam sciposedas la plenan enhavaĵon de ĉiu ludmano kaj ekde tiam antaŭen deponas siajn kartojn kun nepre preciza intencado kvazaŭ la ceteraj ludantoj jam eksterenturnintus siajn kartaversojn.

La analizkapablon ni ne konfuzu kun simpla inĝenieco; ĉar, kvankam la analizisto laŭnecese inĝenias, la inĝeniulo ofte mirinde malkapablas analizi. La konstru- aŭ kombinscipovo, pere de kiu la inĝenieco kutime
evidentiĝas kaj al kiu la frenologoj (erare, mi opinias) atribuis apartan organon, supozante ĝin esti prakapablo, elmontriĝis tiel ofte ĉe homoj kies intelekto en ĉiu alia maniero alproksimiĝis idiotecon ke abunde komentas la kondiĉon aŭtoroj pri moroj. Inter inĝenieco kaj analizkapablo ekzistas efektive ege pli granda diferenco ol tiu ekzistanta inter fantazio kaj imago, kvankam en maniero nepre analoga.

Okazas, verdire, ke inĝeniuloj estas ĉiam fantaziaj dum _aŭtentaj_ imagemuloj ne povas iam esti aliaj ol analizaj.

La sekvonta rakonto ŝajnos al la leganto sendube speco de komentario pri tiuj ĵus proponitaj teorioj.

Loĝante en Parizo dum la printempo kaj parto de la somero de 18....,
mi ekkonatiĝis tie kun iu S-ro C. Aŭgusto Dupino. Tiu juna estimato fontis el bonega, verdire eminenta familio, sed, pro sinsekvo da malkutimaj eventoj, malsuprenfalis al tiel malriĉa vivnivelo ke la energio de lia karaktero venkiĝis sub ĝi kaj li ĉesis frekventi la mondon aŭ entrepreni rekonsistigi siajn fortunojn. Pro la bonvolo de liaj kreditoroj ankoraŭ restis al li eta ero de lia heredaĵo, kaj, helpe de la enspezoj devenantaj de ĝi, li sukcesis, pere de rigora ekonomio, akiri la bazajn bezonaĵojn de la vivo sen devi okupiĝi pri ties superfluaĵoj. Libroj, efektive, fariĝis lia ununura lukso kaj en Parizo tiuj facile haveblas.

Nia unua renkontiĝo okazis ĉe malmultkonata biblioteko de Monto-Martiro-Strato kie nia komuna sorto, postulante ke ni serĉu sammomente la saman ege raran kaj ege mirindan volumon, nin pliproksimigis unu al la alia. Foje kaj refoje, denove kaj redenove, ni
ekkunestis. Mi ege interesiĝis pri la mallonga familia historio kiun li rakontis al mi kun ĉiu tiu malkaŝemo kiun ĉiu Franco permesas al si kiam temas pri la memo. Surprizis min ankaŭ la vasta etendiĝo de lia legadsperto kaj, antaŭ ĉio, mi sentis ardiĝi mian animon pro la sovaĝa avido kaj la vigla freŝeco de lia imagkapablo. Serĉante en Parizo la celobjektojn kiujn mi tiam deziris, mi opiniis ke la kompanio
de tia viro estos por mi pretervalora trezoro. Tiun opinion mi malkaŝe
sciigis al li. Finfine ni aranĝis kunloĝadon dum mia gastado en la urbo. Pro tio ke mia monprovizo estis malpli limigita ol lia, mi konsentis lui kaj mebli, laŭ stilo konvena al la iom fantazia malĝojo de nia komuna karaktero, tempoeroditan kaj groteskan domegon, de longe
dezertan pro superŝticoj pri kiuj ni ne enketis, kaj falantan en kadukecon en apartigita kaj ruinigita parto de Sankta-Ĝermano-Kvartalo.

Se la mondo konsciintus pri la rutino de nia tiuloka vivado, ĝi nin taksintus frenezuloj—kvankam, eble, frenezuloj de senminaca karaktero.
Nia izoliĝo estis nepra. Ni akceptis neniajn vizitantojn. Efektive, la situejon de nia retiriĝo mi zorge malsciigis al miaj antaŭaj kunlaborantoj kaj jam de multaj jaroj Dupino ĉesis gasti kaj gastigi en
Parizo. Ni ekzistis entute inter ni mem.

Mia amiko ĝuis strangan fantazion (kiel alie mi nomu ĝin?): apartan amon al la nokto mem, por ties propra eco. Mi komencis partopreni tute
bonvole en tiu _strangaĵo_ same kiel en ĉiuj ceteraj tiaĵoj liaj. Kun nepra _senbrideco_ mi konsentis pri liaj kuriozaj kapricoj. Kiam ne
plaĉis al la zibelkolora diino gasti ĉe ni, ni falsis ŝian ĉeeston. Je la unua matena tagiĝlumo ni fermis ĉiujn masivajn fenestroŝutrojn de nia malnova konstruaĵo, lumigis paron da kandeloj kiuj, forte parfumite, eligis nur la plej palaĉajn kaj plej feblajn radiojn. Helpe
de tiuj ni aktivigis niajn animojn pere de revado—legante, verkante, konversaciante—ĝis kiam la horloĝo nin informis pri la alveno de aŭtenta Malhelo. Tiam ni eliris la domon, celante ekskursadi en la stratoj, brako-sub-brake, daŭre diskutante pri la dumtagaj temoj, aŭ promenante tien kaj ĉien ĝis malfrua horo, serĉante inter la diboĉaj

lumoj kaj ombroj de la granda urbo tiun senfinon da mensa ekscitado kiun
povas havigi trankvila observado.

En tiuj momentoj mi ne povis ne prikonscii kaj primiri (kvankam lia fertila ideismo jam pretigis min ĝin supozi) apartan analizkapablon ĉe Dupino. Verŝajne ege plaĉis al li, se ne intence ĝin elmontri, almenaŭ ĝin utiligi, kaj li ne hezitis agnoski la plezuron tiel sentitan. Li fanfarone diris al mi, kun mallaŭta kluksona ridado, ke la plej multaj homoj, kompare al li, portas kvazaŭajn fenestrojn en siaj brustoj kaj li kutime subtenis tiajn deklaraĵojn prezentante senperajn kaj ege surprizajn pruvojn pri lia intima kono pri la mia. Lia maniero en tiaj momentoj estis frigida kaj abstrakta. Liaj okuloj sensigniĝis. Lia voĉo, kutime riĉtenora, iom sopraniĝis preskaŭ ĝis impertinenteco, konservante tamen sian ĉiaman zorgan kaj nepre klaran elparolmanieron. Observante lin sperti tiujn humorojn, mi ofte meditis pri la malnova filozofio de la Du-Parta Animo kaj distris min imagante duoblan Dupinon: la kreivan kaj la solvan.

Oni ne supozu, laŭ tio kion mi ĵus diris, ke mi rakontas misteron aŭ verkas romanon. Tio kion mi priskribis ĉe la Franco estis nur la rezulto de ekscitita, aŭ eble malsanigita, intelekto. Sed pri la karaktero de liaj diraĵoj en la koncernaj tempoj, ekzemplo pli bone komprenigos la aferon.

Ni promenadis iun nokton laŭ longa malpura strato proksime al Reĝa-Palaco. Okupiĝante ambaŭflanke, ŝajne, pri aparta meditado, dum almenaŭ dek kvin minutoj nek li nek mi eldiris ununuran silabon. Subite
Dupino interrompis la silenton per ĉi-tiuj vortoj.

"Li estas ege malalta ulo, mi diru la veron, kaj pli bone taŭgus al Varieteo-Teatro."

"Tion ni ne pridubu," mi respondis aŭtomate kaj ne konsciante unuamomente (tiom mi priatentis nur mian propran meditadon) pri la eksterordinara maniero en kiu la parolinto eĥadis miajn proprajn pensadojn. En la sekvinta momento mia menso revenis al la nuna tempo kaj
mia miro ekprofundis.

"Dupino," mi diris serioze, "tio preteriras mian komprenon. Mi ne hezitas agnoski mian miron kaj apenaŭ scipovas kredi miajn sensojn. Kiel eblas ke vi sciis ke mi pensis pri...?" Ĉi-tie mi paŭzis, dezirante ekcerti preterdube ĉu li vere scias pri kiu mi pensis.

"...pri Ĉantijo," li diris. "Kial vi paŭzas? Vi opiniadis silente ke lia malgranda figuro lin maltaŭgigas por tragedio."

La temo estis precize tiu kiun mi ĵus primeditadis. Ĉantijo estis antaŭa ŝuflikisto de Sankta-Deniso-Strato kiu, fervoriĝinte pri la scenejo, entreprenis ludi la rolon de Kserkso en la samtitola tragedio
de Krebijono kaj sin ege malfavore kritikigis pri sia laboro.

"Diru al mi, nome de Ĉielo," mi deklaris, "la metodon—se temas pri metodo—per kiu vi sukcesis scipenetri mian animon pri tiu afero." Efektive, mi eĉ pli multe surpriziĝis ol mi bonvolis agnoski.

"Estis la fruktovendisto," respondis mia amiko, "kiu instigis vin konkludi ke la plandumriparisto ne sufiĉe altas por ludroli kiel Kserkso aŭ aliaj samspecaj homoj."

"La fruktovendisto! Vi mirfrapas min! Mi konas nenian ajn fruktovendiston!"

"La viro kontraŭkurinta vin kiam ni eniris la straton—povas esti, antaŭ dek kvin minutoj."

Nun mi memoris ke, efektive, fruktovendisto, portante surkape grandan korbon da pomoj, preskaŭ terenfaligis min hazarde, dum ni elpasis C.....-Straton en la vojon kie ni nun staris. Tamen mi nepre ne komprenis kiu rilato kunligis tion kaj Ĉantijon.

Dupino estas neniel _ĉarlatano_. "Mi klarigu," li diris, "kaj, por ke vi komprenu klare ĉion, ni unue resekvu la itineron de viaj meditadoj ekde la momento en kiu mi parolis al vi ĝis tiu de la renkontiĝo kun la koncerna fruktovendisto. La pli grandaj eroj de la ĉeno estiĝas tial: Ĉantijo, Oriono, D-ro Nikolo, Epikuro, stereotomio, la pavimŝtonoj, la fruktovendisto."

Estas malmultaj homoj kiuj en laŭhazarda vivmomento ne elektis distriĝi rememorante la pensaditineron ilin kondukintan al apartaj opinioj. La entrepreno ofte plenas je intereso. Tiu kiu unuan fojon entreprenas la taskon miregas pri la ŝajne senlimaj distanco kaj senkohero apartigantaj la komenc- kaj la finpunktojn. Kiel granda tial
estis sendube mia mirego kiam mi aŭdis la Francon anonci la ĵusan informon dum mi ne scipovis malagnoski ties veron. Li daŭrigis:

"Ni parolis pri ĉevaloj, se mi bone memoras, ĵus antaŭ ol eliri C.....-Straton. Tio estis la lasta temo kiun ni pridiskutis. Dum ni transiris en la nunan straton, fruktovendisto, portante surkape grandan
korbon, rapide preterpasante nin tanĝamove, flankenŝovis vin sur amason da pavimŝtonoj tie kunigitaj kie oni riparas la irvojon. Vi surpaŝis unu el la malfiksaj ŝtonoj, stumbletis, iom tro streĉis maleolon, ekestigis ĝenitan aŭ paŭtan mienon, murmuretis kelkajn vortojn, turniĝis por rigardi la amason, tiam antaŭeniris silente. Mi ne atentis apartacele vian konduton, sed lastatempe observado fariĝis por mi speco de neprajo."

"Vi fiksrigardis la grundon, kontrolante kun iritiĝema aspekto la truojn kaj sulkojn de la pavimento (tiel mi konsciis ke vi ankoraŭ pripensis la ŝtonojn) ĝis kiam ni atingis la vojeton nomiĝantan "Lamartino", kiun, eksperimentcele, oni pavis per superkuŝigitaj kaj nititaj blokoj. Ĉi-tie via mieno heliĝis kaj, vidante moviĝi viajn lipojn, mi ne rajtis dubi ke vi murmuris la vorton "stereotomio", terminon kiun oni pompe atribuas al tiu speco de pavimento. Mi sciis ke
vi ne sukcesus diri al vi "stereotomio" sen ekpensi pri atometoj kaj rezulte pri la teorioj de Epikuro kaj, pro tio ke kiam antaŭnelonge ni pridiskutis tiun temon mi menciis al vi kiel malkutime, tamen kiel senrimarke, la svagajn divenojn de tiu eminenta Heleno konfirmis nia lastatempa nebuloza kosmogonio, mi opiniis ke vi ne povus eviti suprendirekti la rigardon ĝis la granda _nebulozo_ en Oriono kaj mi nepre atendis ke vi tiel kondutu. Efektive, vi jes ja suprenrigardis kaj
nun mi certis esti sekvinta ĝuste vian pensadvojon."

"Tamen en tiu akra riproĉado aperinta kontraŭ Ĉantijo en la hieraŭa _Muzeo_, la satiristo, aludante tiel hontinde la nomŝanĝon efektivigitan de la ŝuflikisto kiam tiu surmetis la kotornon, citis Latinlingvan linion pri kiu ni ofte konversaciis. Mi volas diri la linion: _Perdidit antiquum litera primum sonum_ (La antikvan sonon detruas la unua litero.). Mi jam diris al vi antaŭe ke la citaĵo aludas Orionon, vorto kiu prae literumiĝis Uriono, kaj pro iuj ecoj havantaj rilatojn kun tiu klarigo, mi konsciis ke ĝin vi ne povintus forgesi. Klare estis, tial, ke senmanke vi kunligus la ideon pri Oriono
kaj tiun pri Ĉantijo. Ke vi jes ja kunligis ilin mi konsciis vidinte la karakteron de la rideto transpasinta viajn lipojn. Vi pensis pri

la
oferbuĉo de la kompatinda ŝuflikisto. Ĝis tiam vi antaŭenkliniĝis piedpaŝante. Nun tamen mi vidis vin vertikaliĝi plenaltecen. Mi certis
tiam ke vi meditadis pri la malalta persono de Ĉantijo. Tiumomente mi interrompis vian meditadon por rimarkigi ke pro tio ke li estas verfakte
ege malgranda ulo, tiu Ĉantijo, li havus pli bonajn ŝancojn sukcesi ĉe Varieteo-Teatro."

Ne longe post tio, ni tralegis vesperan numeron de _Tribunala Gazeto_ kiam la sekvontaj linioj kaptis nian atenton.

EKSTERORDINARAJ MURDOJ. Hodiaŭmatene, ĉirkaŭ la tria horo, vekis la dormantajn loĝantojn de Sankta-Roĥo-Kvartalo sinsekvo da teruraj ŝirkrioj fontintaj verŝajne el la kvara etaĝo de domo de Kadavrejo-Strato, apartenanta laŭ la ĝenerala scio ekskluzive al iu S-rino Lespanajo kaj ŝia filino Fraŭlino Kamijo
Lespanajo. Post ioma prokrasto, okazigita per sensukcesa klopodo
sin enlasigi en la kutima maniero, oni rompis la ĉefpordon per levstango kaj ok-dek najbaroj eniris, en la kompanio de du ĝendarmoj. En tiu momento la krioj jam ĉesis sed, dum la vizitantaro suprenrapidiĝis laŭ la unua ŝtuparo, du krudaj voĉoj, aŭ eĉ pli, aŭdiĝis kolere disputante verŝajne en la supera nivelo de la domo. Kiam la enirintoj atingis la duan etaĝon ankaŭ tiuj disputbruoj jam silentis kaj ĉio restis en nepra sensono. La kontrolantaro diskuniĝis diversdirekten, hastante de ĉambro al ĉambro. Alveninte grandan malantaŭflankan ĉambron de la kvara etaĝo (post malfermi perforte la pordon kies ŝlosilo troviĝis en la interna ŝlosiltruo), la enketantoj ekvidis spektaklon pli mirigan ol timigan.

Granda ĥaoso malbeligis la apartamenton: rompitaj kaj flankenĵetitaj mebloj kuŝis dise ĉirkaŭ la tuta ĉambro. Estis nur unu litkadro sed de sur tiu oni formetis la liton kaj ĝin ĵetis en la mezon de la ĉambro. Sur seĝo kuŝis razilo, ŝmirite je sango. Sur la fajrejo vidiĝis du-tri longaj dikaj bukloj da griza homhararo, ankaŭ trempetite je sango, kaj verŝajne fortirite ekde la radikoj. Sur la planko troviĝis kvar Napoleon-moneroj, topaza orelringo, tri grandaj arĝentaj kuleroj, tri pli malgrandaj kuleroj de Alĝera falsarĝento kaj du
sakoj enhavantaj preskaŭ kvar mil orfrankojn. La tirkestoj de iu
ŝranko, staranta en unu angulo, estis malfermitaj kaj verŝajne disrabitaj, kvankam ankoraŭ restis en ili multaj objektoj. Malgranda fera monŝranko malkovriĝis sub la _lito_ (ne sub la litkadro). Ĝi estis malfermita kaj la ŝlosilo staris ankoraŭ en la pordo. Ĝi enhavis nur kelkajn malnovajn leterojn kaj ceterajn
senvalorajn dokumentaĵojn.

Pri S-rino Lespanajo neniaj spuroj vidiĝis ĉi-tie. Sed malkutima
kvanto da fulgo troviĝis en la fajrejo pro kio oni kontrolis la kamentubon kaj el ĝi fortrenis (horora rakontendaĵo!) la kadavron de la filino, renversitan kaj suprenŝovitan ioman distancon en la mallarĝan malfermaĵon. La korpo ege varmis. Ĝin kontrolante, oni rimarkis multajn ekskoriaĵojn sendube okazigitajn pro la perforto per kiu ĝi enŝoviĝis kaj eltiriĝis. La vizaĝo elmontris multajn severajn grataĵojn kaj la gorĝo malhelajn ekimozojn kaj profundajn ungonoĉojn kvazaŭ la viktimo mortintus pro strangolado.

Post kompleta enketo pri ĉiu ero de la domo kaj sen malkovri ceterajn indicojn, la kontrolantaro antaŭeniris en malgrandan pavimitan korton situantan malantaŭ la domo kaj tie kuŝis la kadavro de la maljunulino. Ŝia gorĝo estis tiel nepre tratranĉita ke kiam oni entreprenis levi la korpon, ties kapo forfalis. Kaj korpo kaj kapo estis horore mutilitaj, precipe la korpo kiu neniel similis homan estaĵon.

Pri tiu timiga mistero ĝis nun ekzistas, laŭ nia kompreno, neniega indico.

La sekvinttaga ĵurnalo raportis tiujn aldonajn detalojn:

LA TRAGEDIO DE KADAVREJO-STRATO. Multajn homojn oni jam intervjuis rilate al tiu ege eksterordinara kaj timiga afero, [la vorto _afero_ ankoraŭ ne havas en Francio tiun humuran signifon kiun ĝi havas ĉe ni] sed okazis ĝis nun nepre nenio povanta ĝin klarigi. Ni citas ĉi-poste ĉiujn materialajn informaĵojn kunigitajn.

PAŬLINO DUBURGO, lavistino, depozicias ke ŝi konas ambaŭ mortintojn jam de tri jaroj, lavinte vestaĵojn por ili dum tiu periodo. La maljunulino kaj la filino ĝuis bonajn rilatojn inter si, estis tre amemaj unu pri la alia. Ili pagis bonsalajre ŝian laboron. Havis neniajn informojn pri vivmaniero nek enspezkvanto de ili. Kredas ke S-rino L. sortodivenis por gajni vivmonon. Laŭonidire havis ŝparkonton. Neniam renkontis aliajn homojn en la domo kiam kolektis aŭ liveris vestaĵojn. Certas ke ili dungis nenian servanton. Verŝajne estis neniaj mebloj en la tuta konstruaĵo krom kvaraetaĝe.

PETRO MOROO, tabakisto, depozicias ke li kutimis vendi etajn kvantojn da fumtabako kaj snuftabako al S-rino Lespanajo dum preskaŭ kvar jaroj. Naskiĝis en la najbarejo kaj de ĉiam loĝas tie. La domon en kiu troviĝis la kadavroj la mortinto kaj ŝia filino enloĝis dum pli ol ses jaroj. Antaŭe enloĝis ĝin juvelisto kiu vicluigis la superajn ĉambrojn al diversuloj. La domo apartenis al S-rino L. Ŝi malkontentiĝis pri la difektaĵoj kiujn la luanto estigis al la proprietaĵo kaj transloĝiĝis tien ŝi mem, malkonsentante luigi iun ajn parton. La maljunulino estis infankonduta. La atestinto vidis la filinon eble kvin-ses fojojn dum la ses jaroj. La paro estigis ege izolitan vivadon, laŭraporte disponis monon. Aŭdis najbarojn diri ke S-rino L. sortodivenas—tamen ne kredas tion. Neniam vidis eniri la domon iun ajn krom la maljunulino kaj ŝia filino, la pordisto unu-du fojojn, kaj kuracisto ok-dek fojojn.

Multaj ceteraj homoj, najbaroj, atestis samdetale. Ili menciis neniun kiel oftan vizitinton de la domo. Oni ne sciis ĉu S-rino L. kaj ŝia filino havas vivantajn parencojn. La ŝutroj de la surstrataj fenestroj nur malofte malfermiĝis. Tiuj de la malantaŭa domflanko estis ĉiam fermitaj, krom tiuj de la granda malantaŭĉambro de la kvara etaĝo. La domo estas bonstata konstruaĵo—ne tre malnova.

ISIDORO MUSETO, ĝendarmo, depozicias ke, vokite al la domo ĉirkaŭ la tria de la mateno, li trovis dudek-tridek homojn starantajn antaŭ la pordego, strebantajn eniri. Malfermis ĝin perforte tempofine, per bajoneto, ne per levstango. Spertis nur malmulte da ĝeno ĝin malfermante pro tio ke ĝi estis duobla aŭ faldpordego, riglita nek supraĵe nek malsupraĵe.

La kriaĉoj daŭre aŭdiĝis ĝis la perforta malfermiĝo de la pordego—tiam subite ĉesis. Ili aŭdiĝis ŝajne kiel kriaĉoj de homo/homoj spertanta/spertantaj grandan doloregon. Estis laŭtaj kaj longdaŭraj, ne mallongaj kaj rapidaj. Depoziciinto malfermis la suprenirantan vojon laŭ la ŝtuparo. Atinginte la unuan etaĝon, aŭdis du voĉojn kverelantajn laŭte kaj kolere. Raŭka estis la unua; ege pli strida, kaj stranga, la alia. Scipovis kompreni kelkajn vortojn eldiratajn de la unua voĉo, voĉo de Franco. Certis ke ne estis voĉo de virino. Sukcesis rekoni la vortojn _sacré_ kaj _diable_. La strida voĉo estis tiu de fremdalandano. Ne certis ĉu ĝi estis vira aŭ ina voĉo. Ne sukcesis malĉifri la eldiritaĵon sed opiniis ke temis pri la Hispana lingvo. La staton de la ĉambro kaj tiun de la kadavroj la depoziciinto priskribis same kiel ni priskribis hieraŭ.

HENRIKO DUVALO, najbaro kaj faka arĝentisto, depozicias esti membrinta en la ensemblo unue enirinta la domon. Konfirmas ĝeneraldetale la depozicion de Museto. Tuj post kiam ili perfortis la enirpordon, ili refermis ĝin por ekskludi la homamason tre rapide kuniĝintan malgraŭ la malfruo de la horo. La strida voĉo, laŭ tiu depoziciinto, estis tiu de Italo. Certis ke ne estis tiu de Franco. Ne certis ĉu ĝi estis virvoĉo. Estis eble virinvoĉo. Ne konis la Italan lingvon. Ne scipovis rekoni apartajn vortojn, tamen konvinkiĝis pro la intonacio ke la parolinto estis Italo. Konis S-rinon L. kaj ŝian filinon. Tre ofte interparolis kun ambaŭ. Certis ke la strida voĉo estis tiu nek de la patrino nek de la filino.

..... ODENHEJMERO, restoraciisto. Tiu atestinto memvole proponis sian ateston. Ne scipovante la Francan, intervjuiĝis pere de interpretisto. Denaska Amsterdamano. Preterpasis la domon en la tempo kiam okazis la ŝirkriegoj. Ili daŭris plurajn minutojn—eble dek. Ili estis longdaŭraj kaj laŭtaj—tre hororaj kaj maltrankviligaj. Nombriĝis inter tiuj enirintaj la domon. Konfirmis la antaŭajn atestaĵojn pri ĉiuj detaloj krom unu. Certis ke la strida voĉo estis tiu de viro—tiu de Franco. Ne sukcesis rekoni la eldiritajn vortojn. Ili estis laŭtaj kaj rapidaj—malkonstantaj—eldiritaj verŝajne ne nur pro timo sed ankaŭ pro kolero. La voĉo estis raŭka—ne tiel strida kiel raŭka. Ne rajtis nomi ĝin strida voĉo. La raŭka voĉo diris ripete '_sacré_,' '_diable_' kaj unu fojon '_mon Dieu_.'

JULIO MINJODO, bankisto de Firmao-Minjodo-kaj-Filo, Deloreno-Strato. Estas la patro. S-rino Lespanajo havis bienon. Malfermis konton ĉe lia banko en la printempo de la jaro .... (ok jarojn antaŭe). Lasis ofte etkvantajn deponaĵojn ĉe li. Eltiris nenion ĝis tri tagojn antaŭ sia morto kiam proprapersone ŝi forprenis 4.000 frankojn. Tiun sumon la banko pagis ormonere kaj banka komizo ŝin akompanis hejmen kun la mono.

ADOLFO LEBONO, komizo ĉe Minjodo-kaj-Filo, depozicias ke en la koncerna tago, ĉirkaŭ tagmezo, li akompanis S-rinon Lespanajon al ŝia loĝejo kun la 4.000 frankoj deponitaj en du sakoj. Kiam la pordo malfermiĝis, Fraŭlino L. aperis kaj forprenis el liaj manoj unu el la du sakoj dum la maljunulino liberigis la alian. Tiam li riverencis kaj foriris. Vidis neniun en la strato en tiu tempo. Malĉefstrato ĝi estis—tre soleca.

GILJOMO BIRDO, tajloro, depozicias esti membrinta en la

ensemblo
enirinta la domon. Estas Anglo. Loĝas en Parizo nur de du jaroj. Estis unu el la unuaj suprenirintaj laŭŝtupare. Aŭdis la voĉojn en kverelado. La raŭka voĉo estis tiu de Franco. Rekonis plurajn vortojn sed ne povas ĉiujn rememori nun. Aŭdis klare '_sacré_' kaj '_mon Dieu_.' Estiĝis en tiu momento sono kredigante ke pluraj personoj interluktas—gratsono, skrappaŝsono. La strida voĉo estis ege laŭta, pli laŭta ol la raŭka voĉo. Certas ke ne estis voĉo de Anglo. Sonis kiel voĉo de Germano. Eblas ke estis ina voĉo. Ne komprenas la Germanan.

Kvar el la suprenomitaj atestintoj, revokite, depoziciis ke kiam
la enketintaro atingis la ĉambron en kiu troviĝis la kadavro de Fraŭlino L., la pordo estis ŝlosita internaflanke. Ĉio nepre silentis, neniaj ĝemoj nek bruoj de iu ajn speco. Perfortinte la pordon, ili vidis neniun. La fenestroj, kaj de la malantaŭa kaj de la antaŭa ĉambroj, estis fermitaj kaj solide fiksitaj de interne. Pordo kunliganta la du ĉambrojn estis fermita sed ne ŝlosita. La pordo kunliganta la antaŭan ĉambron kaj la koridoron estis ŝlosita kaj la ŝlosilo situis internaflanke. Malgranda ĉambro situanta kvaraetaĝe en la antaŭa parto de la konstruaĵo, ĉe la komenco de la koridoro, estis malfermita kaj ties pordo duonaperta. Tiu ĉambro plenegis je malnovaj litoj, skatoloj, kaj tiel plu. Oni forportis kaj zorge kontrolis tiujn.
Nepre ĉiun colon de ĉiu ero de la domo oni zorge kontrolis. Per tiucelaj brosoj oni kontrolesploris la tutan longon de la kamentuboj. La domo disponis kvar etaĝojn kaj mansardojn. Surtegmenta klappordo estis zorge fermita per najloj—verŝajne restante tia jam de multaj jaroj. La tempodaŭron okazintan inter
la ekaŭdo de la kverelantaj voĉoj kaj la perforta malfermo de la ĉambropordo malsame kalkulis la atestintoj. Kelkaj proponis mallongan tempon: tri minutojn. Aliaj, pli longan tempon: kvin minutojn. La pordo malfermiĝis tre malfacile.

ALFONSO GARSIO, funebraĵisto, depozicias ke li loĝas en Kadavrejo-Strato. Estas landano de Hispanio. Partoprenis en la domenirado. Ne iris supraetaĝen. Facile nervoziĝas kaj timas eblajn rezultojn de agitiĝo. Aŭdis la kverelantajn voĉojn. La bruska voĉo estis tiu de Franco. Ne komprenis kion oni diris. La
strida voĉo apartenis al Anglo. Certas pri tio. Ne scipovas la Anglan lingvon sed juĝas laŭ la intonacio.

ALBERTO MONTANO, frandaĵisto, depozicias ke li nombriĝis inter la unuaj suprenirintoj. Aŭdis la koncernajn voĉojn. La raŭka voĉo estis tiu de Franco. Rekonis plurajn vortojn. La parolanto ŝajnis protestadi. Ne sukcesis distingi la vortojn de la strida voĉo. Parolis rapide kaj malkonstante. Opinias ĝin voĉo de Ruso. Konfirmas la ĝeneralan atestaĵaron. Estas Italo. Neniam interparolis kun landano de Rusio.

Pluraj atestintoj, revokite, nun depoziciis ke la fumtuboj de ĉiuj kvaraetaĝaj ĉambroj estis tro mallarĝaj por permesi la trapason de homa korpo. Dirante "tubbrosoj" oni aludis la cilindrajn balaibrosojn utiligatajn de kamentubistoj. Tiujn brosojn oni laŭirigis supren kaj malsupren en ĉiu kamentubo de la domo. Ne estas malantaŭflanka ŝtuparo laŭ kiu homo povintus descendi samtempe dum la enirantoj suprenrapidiĝis. La korpo de Fraŭlino Lespanajo estis tiel solide fiksita en la tubo ke oni ne
sukcesis ĝin eligi ĝis post kvar-kvin helpantoj kunigis siajn klopodojn.

PAŬLO DUMASO, kuracisto, depozicias ke li estis vokita ĉirkaŭtagiĝe por kontroli la korpojn. Ambaŭ kuŝis tiam sur la litkadra kanabaĵo en la ĉambro kie malkovriĝis Fraŭlino L. La kadavro de la juna virino estis ege kontuzita kaj ekskoriita.

Sendube kaŭzis tiujn aspektojn tio ke ĝi profunde enŝoviĝis en la kamentubon. La gorĝo estis ege frotaĉita. Vidiĝis ĵus submentone pluraj profundaj ekskoriaĵoj, same kiel sinsekvo da lividaj makuloj rezultigitaj laŭindikaĵe far fingropremado. La vizaĝo timige miskoloriĝis kaj la okulgloboj elstaregis. La lango estis duone tramordita. Granda ekimozo malkovriĝis en la stomakokavo, kaŭzite sendube far genupremo. Laŭ la opinio de S-ro Dumaso, Fraŭlinon Lespanajon mortigis per strangolado homo aŭ homoj nekonataj.

La kadavro de la patrino estis horore mutilita. Ĉiuj ostoj de la dekstraj kruro kaj brako estis pli-malpli frakasitaj. La maldekstra tibio kaj aldone ĉiuj ripoj de la maldekstra flanko, ege splititaj. La tute korpo, ege kontuzita kaj miskolorigita. Ne eblis diri kiel la vundoj kaŭziĝis. Peza lignoklabo, aŭ larĝa ferstango—seĝo—iu ajn granda, peza, obtuza armilo povintus estigi tiajn rezultojn manipulate per la manoj de ege fortika viro. Nenia virino povintus trudi la batojn per iu ajn armilo. La kapo de la mortinto, vidite de la atestinto, estis entute apartigita disde la korpo kaj estis ankaŭ ege frakasita. La gorĝo estis tratranĉita verŝajne per ege akra ilo—sendube per razilo.

ALEKSANDRO ETJENO, kirurgo, estis alvokita kun S-ro Dumaso por kontrolesplori la kadavrojn. Konfirmis la atestaĵojn kaj opiniojn de S-ro Dumaso.

Nenia grava ceteraĵo eksciiĝis, kvankam intervjuiĝis pluraj ceteraj homoj. Murdo tiel mistera, tiel perpleksiga pri ĉiuj detaloj, neniam antaŭe okazis en Parizo—se verfakte temas pri murdo. La polico entute malscipovas klarigi la aferon—malkutima stato ĉe ili okaze de tiaj eventoj. Tamen ankoraŭ ne aperis la plej eta indico-ombro.

La vespera numero de la ĵurnalo raportis ke la plej granda ekscito daŭre agitas Sankta-Roĥo-Kvartalon, ke oni zorge rekontrolis la koncernajn ejojn kaj novfoje intervjuis la atestintojn, sed entute sensukcese. Postskribo menciis tamen ke Adolfo Lebono arestiĝis kaj malliberiĝis, kvankam nenio ŝajnis lin kulpigi krom la jam anoncitaj faktoj.

Dupino ŝajnis multege interesiĝi pri la progreso de tiu afero—almenaŭ tiel mi juĝis laŭ lia maniero, ĉar li komentis nenion. Nur post la anonco pri la malliberigo de Lebono li petis mian opinion rilate al la murdoj.

Mi rajtis nur konsenti kun la tuta Parizanaro, tiujn konsiderante kiel nesolveblan misteron. Mi konceptis nenian rimedon pere de kiu spuri la murdinton.

"Ni ne juĝu laŭ la rimedo," diris Dupino, laŭ tiu rudimenta kontrolesploro. La Pariza polico, tiel laŭdate pri _sagaceco_, estas ruza, sed nur ruza. Iliaj entreprenoj estas senmetodaj krom la provizora metodo de la momento. Ili elmontre envicigas multajn rimedojn sed, ne malofte, tiuj tiel maltaŭgas al la proponitaj celoj ke ili nin pensigas pri S-ro Ĵurdeno kiam li petas sian _robe-de-chambre pour

mieux entendre la musique_ (ĉambrorobon por pli bone aŭdi la muzikon).
La rezultoj kiujn ili efektivigas estas ne malofte surprizaj, sed plejofte tiujn estigas ordinaraj diligenteco kaj aktivado. Kiam mankas
tiuj kvalitoj iliaj entreprenoj malsukcesas. Vidoko, ekzemple, estis bona divenisto kaj persista viro. Sed sen edukita pensado li eraris konstante pro la intenseco mem de sia kontrolesplorado. Li difektis sian
vidkapablon tenante tro proksime la celobjekton. Li vidis eble unu-du punktojn kun malkutima klareco, tamen agante tiel li perdis elvide la aferon kiel tutaĵon.

"Rezultas tial ke oni povas agi tro profunde. La vero ne sidas ĉiam en puto. Efektive, rilate al la plej grava scio, mi opinias ke la vero estas jes ja senmanke surfaca. Profundeco situas en la valoj kie ni serĉas la veron, ne sur la montopintoj kie ni ĝin malkovras. La modoj kaj fontoj de tiu erarspeco bone ekzempliĝas en nia meditado pri la astroj. Spektadi stelon per ekrigardetoj, ĝin okulkontroli per deflanka rigardado, turni ĝiadirekten la eksterajn partojn de la retino
(kiuj pli facile kaptas malfortajn lumradiojn ol la internaj partoj), tio estas percepti la stelon klardetale, tio estas havigi al si la plej bonan alttakson pri ties brilo—brilo kiu malheliĝas proporcie dum ni direktas pli kaj pli plenan rigardon al ĝi. En tiu lasta kazo pli da radioj trafas verfakte la okulojn sed en la antaŭa ekzistas pli rafinita komprenkapablo. Pere de maltaŭga profundeco ni konfuzas kaj malfortigas la pensadon. Ni povas eĉ malaperigi el la firmamento Venuson mem per spektado tro longdaŭra, tro koncentrita, tro rekta."

"Rilate al tiuj murdoj, ni mem entreprenu kelkajn kontrolesplorojn antaŭ ol finopinii pri ili. Enketo provizos nin per distriĝo,"
[mi juĝis la vorton stranga, utiligitan tiumaniere, sed mi nenion diris] "kaj krome Lebono foje estigis helpon al mi pro kio mi ne estas
maldankema. Ni mem iru kaj kontrolu proprokule la murdejon. Mi konas G.....on, Prefekton de Polico, kaj spertos nenian ĝenon akirante la devigan permeson."

La permeson li akiris kaj tuj ni aliris Kadavrejo-Straton. Tiu estas unu el tiuj aĉaj vojetoj intervenantaj Riĉeljeo-Straton kaj Sankta-Roĥo-Straton. La posttagmezo malfruhoris kiam ni atingis ĝin ĉar tiu kvartalo situas tre malproksime disde tiu kiun ni enloĝis. La domon ni facile trovis ĉar multaj homoj fiksrigardis la fermitajn supraetaĝajn ŝutrojn kun sencela scivolemo ekde la kontraŭa flanko de la vojo. Ĝi estis ordinara Pariza loĝdomo kun pordego ĉe unu flanko de kiu situis vitrita kontrolbudo havanta en la fenestro glitpanelon identigantan ĝin kiel apartamenton de pordisto. Antaŭ ol eniri ni piediris laŭ la strato, turniĝis en flankaleon kaj, tiam turniĝante denove, preterpasis la malantaŭaĵon de la konstruaĵo. Intertempe, Dupino okulkontrolis, krom la domo, ankaŭ la tutan najbarejon, kun zorgega atento kies celon mi nepre ne komprenis.

Revenante inverse laŭ la sama vojo ni atingis denove la ĉefenirejon de la domo kaj, elmontrinte niajn identigdokumentojn, estis enlasitaj de la respondecaj agentoj. Ni aliris la supraetaĝan ĉambron kie malkovriĝintis la korpo de Fraŭlino Lespanajo kaj kie ankoraŭ kuŝis ambaŭ mortintoj. La ĥaosa stato de la ejo restis senŝanĝe, konforme al polica procedo. Mi vidis nenion krom tio kion raportis _Tribunala Gazeto_. Dupino kontrolesploris ĉion, inkluzive la korpojn de la viktimoj. Tiam ni vizitis la aliajn ĉambrojn kaj la korton, ĉie akompanate de ĝendarmo. La kontrolesploro daŭris ĝis la tagfina malheliĝo kiam ni foriris. Survoje al la hejmo mia kuniranto paŭzis momenton ĉe la oficejo de unu el la ĉiutagaj ĵurnaloj.

Mi jam diris ke la kapricoj de mia amiko estis multnombraj kaj ke _Je

les ménageais_ (Mi toleris ilin kun bonhumoro, eĉ respekto.)—por tiu diraĵo la Angla lingvo ne havas ekvivalenton. Lia nuna humoro instigis
lin malkonsenti konversacii pri la murdoj antaŭ ĉirkaŭ tagmezo de la sekvinta tago. Tiam li demandis subite al mi ĉu mi konstatis ion _strangan_ ĉe la sceno de la abomenaĵo.

Lia emfazmaniero, kiam li diris la vorton _strangan_, enhavis ion kiu ektremigis min, sen ke mi prikonsciu la kialon.

"Ne, nenion _strangan_," mi diris. "Almenaŭ nenion krom tio kion ni ambaŭ legis en la ĵurnalo."

"La _Gazeto_," li respondis, "ne pritraktis, mi timu, la malkutiman hororon de la afero. Sed ni flankenmetu la malutilajn opiniojn de tiu eldonaĵo. Ŝajnas al mi ke oni konsideras tiun misteron nesolvebla pro tiu kialo mem kiu devus ĝin konsiderigi solvebla. Mi volas diri la _outré_-an [t.e., la troigitan] karakteron de ties konsistigantaĵoj. Perpleksigas la policon la ŝajna manko de motivo—ne pri la murdo mem—sed pri la abomeneco de la murdo. Mistifikas ĝin ankaŭ la ŝajna maleblo akordigi la voĉojn aŭditajn en kverelado kaj tion ke malkovriĝis supraetaĝe neniu krom la mortigita Fraŭlino Lespanajo kaj, aldone, tion ke ne ekzistis cetera elirrimedo kiun povintus preteratenti la suprenirintaro. La sovaĝa malbonordo de la ĉambro; la kadavro suprenŝovita, kapon malsupren, en la kamentubon; la terura mutilado de la kadavro de la maljunulino; tiuj konsiderindaĵoj kune kun tiuj antaŭe menciitaj kaj ceteraj kiujn ne necesas mencii, ĉio sufiĉis paralizi la potencojn, nepre kulpiginte la memlaŭditan _sagacecon_, de la registaraj agentoj. Ili sin faligis en krudan sed oftan eraron, intermiksinte malkutimecon kaj kompleksegecon. Sed estas
pere de tiuj devojiĝoj disde la irejo de ordinaraĵoj ke la racio palpete malfermas sian vojon, laŭeble, serĉante la veron. Dum tiaj kontrolesploradoj kiajn ni nun entreprenas la taŭga demando estas, ne 'Kio okazis?' sed 'Kio okazis neniam antaŭe okazinta?' Efektive, la facilo per kiu mi atingos, aŭ jam atingis, la solvon de tiu mistero staras en senpera proporcio kun ties laŭpolice verŝajna nesolvebleco."

Mi fiksrigardis la parolinton kun senparola miro.

"Mi nun atendas," li daŭrigis, rigardante ĝis la pordo de nia apartamento, "mi nun atendas homon kiu, kvankam eble ne la farinto de tiuj buĉadoj, sendube iomagrade partoprenis en ili. Pri la plej horora parto de la krimoj efektivigitaj probablas ke li estas senkulpa.
Mi esperas ne erari pri tiu supozaĵo ĉar sur ĝi mi starigas mian anticipon ekpovi sondumi la tutan enigmon. Mi atendas la alvenon de la
viro ĉi-tien, en ĉi-tiun ĉambron mem, ĉiuajnmomente. Kvankam eblas ke li malkonsentu tiel agi, probablas ke li alvenos. Kaj se li alvenos,
necesos ke ni lin detenu. Jen pistoloj kaj ambaŭ ni scipovas ilin utiligi kiam la situacio tion devigas."

Mi enmanigis la pistolojn, apenaŭ prikonsciante tion kion mi faris, apenaŭ kredante tion kion mi aŭdis, dum Dupino daŭre paroladis, kvazaŭ monologante. Mi jam menciis lian abstraktan manieron en tiaj momentoj. Siajn proklamojn li direktis al mi, sed lia voĉo, kvankam certe ne laŭta, havis tiun intonacion kutime utiligatan por paroli al iu situanta fordistance. Liaj okuloj, sen esprimlumo, rigardis ununure
la muron.

"Ke la kverelantaj voĉoj," li diris, "aŭditaj de la suprenirantaro ne estis la voĉoj de la virinoj mem, tion entute pruvis la indicaro. Tio

forigas ĉiun dubon pri la demando ĉu la multaĝulino unue mortigis la filinon, tiam poste sin mortigis. Mi priparolas tiun punkton plejparte nome de la metodo. Ĉar la fizika forto de S-rino Lespanajo nepre malsufiĉintus por suprenŝovi la kadavron de la filino en la kamentubon tiel kiel oni ĝin malkovris. Kaj la karaktero de la vundoj sur ŝia propra korpo entute forigas ĉiun ideon pri sindetruo. Murdon tial efektivigis tria aro kaj la voĉoj de tiu tria aro estis la aŭditaj kverelantaj voĉoj. Mi nun atentigu—ne la tutan atestaĵaron pri tiuj voĉoj—sed tion kio _strangis_ en tiu atestaĵaro. Ĉu vi konstatis tiurilatan strangaĵon?"

Mi rimarkis ke, dum ĉiuj atestintoj konsentis kunopinii ke la raŭka voĉo estis tiu de Franco, ili ege malkonsentis pri la strida, aŭ laŭ la priskribo de iu atestinto, la raspa voĉo.

"Tio estis la atestaĵaro mem," diris Dupino, "sed ne la strangeco de la atestaĵaro. Vi konstatis nenion distingan, tamen estis jes ja distingaĵo. La atestintoj, laŭ via raporto, konsentis pri la raŭka voĉo. Tiurilate ili estis unuanimaj. Sed rilate al la strida voĉo, la strangaĵo situas, ne en ilia malkunkonsento, sed en tio ke, kiam Italo, Anglo, Hispano, Nederlandano kaj Franco entreprenis ĝin priskribi, ĉiu ĝin identigis kiel voĉon de _fremdalandano_. Ĉiu certas ke ne estis voĉo de unu el siaj samlandanoj. Ĉiu similigas ĝin—ne al la voĉo de denaska loĝanto de iu lando kies lingvon li iom konas—sed tute kontraŭe."

"La Franco opinias ĝin voĉo de Hispano kaj 'povintus rekoni kelkajn vortojn _se li konintus la Hispanan lingvon_.' La Nederlandano asertas ke ĝi estis voĉo de Franco; tamen ni legas en la policaj raportoj ke '_ne scipovante la Francan, tiu atestinto intervjuiĝis pere de interpretisto_.' La Anglo opinias ke ĝi estis voĉo de Germano kaj '_ne komprenas la Germanan_.' La Hispano 'certas' ke ĝi estis voĉo de Anglo sed 'taksas entute laŭ la intonacio' pro tio ke '_li havas nenian konon pri la Angloj_.' La Italo juĝas ĝin voĉo de Ruso sed '_neniam parolis kun landano de Rusio_.' Dua Franco malkonsentas krome kun la unua, certante ke la voĉo estis tiu de Italo. Tamen '_ne scipovante tiun lingvon_,' li konvinkiĝis, same kiel la Hispano, 'pro la intonacio.'"

"Nu, kiel malkutime aparta, ni devas supozi, estis verfakte tiu voĉo povinta instigi tiajn atestaĵojn—eĉ en kies tonoj rekonis nenion konatan la landanoj de kvin grandaj nacioj de Eŭropo. Vi diros ke ĝi estis eble voĉo de Aziano, aŭ Afrikano. Nek Azianoj nek Afrikanoj multnombriĝas en Parizo. Tamen, sen kontraŭstari la hipotezon, mi nun atentigu nur tiujn tri punktojn. La voĉon unu atestinto priskribas kiel 'raspan, ne stridan'. Du aliaj raportas ĝin esti 'rapida kaj _malkonstanta_.' Neniajn vortojn—neniajn vortsimilajn sonojn, iu ajn atestinto menciis kiel rekoneblajn."

"Mi ne scias," daŭrigis Dupino, "kiujn efektojn mi estigis ĝis nun, eble, sur vian komprenon. Sed mi ne hezitas diri ke laŭleĝaj konkludoj fontintaj el eĉ nur tiu parto de la atestaĵaro—la parto rilatanta al la raŭkaj kaj stridaj voĉoj—jam sufiĉas en si por naskigi suspekton devontan fiksi direkton al ĉiu posta progresado en la kontrolesploro pri la mistero. Mi diris 'laŭleĝaj konkludoj' sed mia voldiro ne plene envortiĝas tiel. Mi deziris sugesti ke la konkludoj estas la _solaj_ ĝustaj kaj ke la suspekto fontas _neeviteble_ el tiuj kiel ununura

rezulto. El kio konsistas tamen tiu suspekto mi ankoraŭ ne konsentas diri. Mi nur deziras ke vi konsideru ke, ĉe mi, ĝi estis sufiĉe forta por doni al miaj demandoj en la ĉambro precizan formon, difinitan emon."

"Nun ni translokiĝu, permense, al tiu ĉambro. Kion ni unue serĉu ĉi-tie? La elirrimedon kiun utiligis la murdintoj. Mi certe ne troigas dirante ke nek vi nek mi kredas je preternaturaĵoj. Sinjorinon kaj Fraŭlinon Lespanajon ne detruis fantomoj. La farintoj de la ago estis materiaj kaj eskapis materie. Tial kiel? Feliĉe, estas nur unu maniero rezonadi pri la temo kaj _necesas_ ke tiu maniero nin konduku al difinita decido. Ni kontrolu, unu post la alia, la eblajn elirrimedojn."

"Klare estas ke la murdintoj enestis la ĉambron kie troviĝis Fraŭlino Lespanajo, aŭ almenaŭ la apudan ĉambron, kiam la enketontaro supreniris laŭŝtupare. Estas tial nur ĉe tiuj du loĝejoj ke ni devas serĉi elirejojn. La polico nudigis la plankojn, plafonojn kaj murmasonaĵojn en ĉiu direkto. Neniajn _sekretajn_ elirejojn povintus preteratenti ilia kontrolado. Tamen, ne fidante _iliajn_ okulojn, mi kontrolis per miaj propraj okuloj. Estis, tial, _neniaj_ sekretaj elirejoj. Ambaŭ pordoj kunligantaj la ĉambrojn kaj la koridoron estis sekure ŝlositaj kaj la ŝlosiloj restis internaflanke."

"Ni konsideru la kamentubojn. Tiuj, kvankam pridisponante ordinaran larĝon ĝis ok-dek futoj super la fajrejo, ne entenos, laŭ sia tuta longo, la korpon de granda kato. Pro tio ke nepras la maleblo eliri pere de rimedoj jam menciitaj, restas al ni nur la fenestroj. Pere de tiuj de la fasadflanka ĉambro neniu povintus eskapi sen ke la surstrata homamaso lin rimarku. Laŭnecese tial la murdistoj trapasis tiujn de la malantaŭflanka ĉambro. Nu, atinginte tiun konkludon en tiel nedubasenca maniero, ni ne rajtas, kiel logikistoj, ĝin malakcepti pro ŝajnaj malebloj. Nur restas al ni pruvi ke tiuj ŝajnaj malebloj estas, verfakte, eblaj."

"Estas du fenestroj en la ĉambro. Unu el ili entute videblas ĉar ĝin obstrukcas neniaj mebloj. La malsupra parto de la alia malvideblas ĉar la kapo de la malfacile manipulebla litkadro estas ŝovita kontraŭ ĝin. La unua fenestro troviĝis en sekura, de interne fermita stato. Ĝi kontraŭstaris la nepran potencon de ĉiuj entreprenintaj ĝin suprenlevi. Granda boriletotruo trapenetris ties kadron maldekstraflanke kaj solidega najlo ĝin ensidis, tien enŝovite preskaŭ ĝiskape. Kontrolado pri la alia fenestro sciigis ke simila najlo simile enfiksiĝis en ĝi kaj ankaŭ malsukcesis vigla klopodo suprenlevi tiun klapon. La polico nun plene konvinkiĝis ke elirvojo nepre ne ekzistis en tiuj direktoj. _Tial_, oni finopiniis ke sencele estus eltiri la najlojn kaj malfermi la fenestrojn."

"Mia propra kontrolesploro estis iom pli partikulara kaj pro la kialo kiun mi ĵus citis, ĉar ĉi-tie, _necesis_, mi certis, ke ĉiuj ŝajnaj malebloj finestiĝu eblaj."

"Mi komencis pensadi jene, _a posteriori_, tio estas, indukte. La murdistoj jes ja eskapis pere de unu el tiuj fenestroj. Se tio veras, ili ne povintus refiksi la klapojn de interne tiel kiel tiuj troviĝis fiksite—konsideraĵo ĉesiginta, pro ties memklaro, la kontroladon entreprenitan de la polico en tiu areo. Tamen la fenestroklapoj estis _jes ja_ fiksitaj. _Necesis_ tial ke ili havu la kapablon sin fiksi. La

konkludo neniel eviteblis."

"Mi alpaŝis la senobstrukcan fenestron, eltiris iom malfacile la najlon, kaj entreprenis levi la klapon. Kiel mi jam antaŭsupozis, ĝi rezistis ĉiujn klopodojn miajn. Mi nun konsciis ke devas ekzisti kaŝita risorto. Tiu konfirmo pri mia ideo konvinkis min ke almenaŭ miaj hipotezoj estis ĝustaj, kiom ajn misteraj ŝajnis la cirkonstancoj rilatantaj al la najloj. Zorga enketo baldaŭ malkovris la kaŝitan risorton. Mi premis ĝin, kaj kontenta pri la malkovro, elektis ne levi la klapon."

"Mi nun remetis la najlon kaj ĝin rigardis atente. Homo eksterenpasinta tra tiu fenestro povintus ĝin refermi eble kaj la risorto realfiksiĝintus, sed tiu ne povintus remeti la najlon. La konkludo estis klara kaj denove mallarĝigis la areon de mia esplorkampo. _Laŭnecese_ la murdintoj forfuĝis pere de la alia fenestro. Se ni supozas tial ke la klaprisortoj entute samis, kiel verŝajnis, _necesas_ rezulte ke malsamu la najloj, aŭ almenaŭ iliaj alfiksiĝrimedoj. Surgrimpinte la sakŝtofon de la litkadro, mi rigardis zorgege super ties kaptabulon la duan fenestroklapon. Malsupreniginte la manon malantaŭ la tabulo, mi tuj trovis kaj premis la risorton kiu, konforme al mia supozo, havis entute la saman karakteron kiel sia najbaraĵo. Nun mi okulkontrolis la najlon. Ĝi estis same solida kiel la alia kaj verŝajne alfiksiĝis sammaniere—enmartelite preskaŭ ĝiskape."

"Vi diros ke mi perpleksiĝis. Sed se vi tiel opinias, sendube vi malkomprenis la karakteron de la induktoj. Uzante sportoterminon, mi eĉ ne unu fojon 'misludis'. Neniam unu sekundon mi perdis la spuron. Okazis difekto en nenia ĉenero. Mi spuris la sekreton ĝis ties fina rezulto kaj tiu rezulto estis _la najlo_. Ĝi havis, mi diru, en ĉiu rilato la aspekton de sia kunilo en la alia fenestro. Tamen tiu fakto estis nepra nulaĵo (kiom ajn decidiga ĝi ŝajnu) kompare al la konsideraĵo ke ĉi-tie, ĉi-punkte finfiniĝis la indico. '_Necesas_ ke la najlo havu maltaŭgaĵon,' mi diris. Mi tuŝis ĝin kaj la kapo, kun kvaroncolo da ties fusto, foraparti ĝis en miaj fingroj. La restaĵo de la fusto daŭre staris fiksite en la boriletotruo kie ĝi jam antaŭe disrompiĝis."

"La frakturo estis malnova (ĉar ties randoj krustiĝis pro rusto) kaj verŝajne fariĝis per martelbato parte alfiksinta en la supraĵon de la malsupra klapo la kaphavan eron de la najlo. Nun mi zorge remetis tiun kapaĵon en la noĉon el kiu mi antaŭe ĝin eltiris kaj la simileco al perfekta najlo estis nepra—la fendo ne videblis. Premante la risorton, mi levis la klapon leĝergeste kelkajn colojn. La najlkapaĵo leviĝis kun ĝi, restante fiksite en sia litaĵo. Mi fermis la fenestron kaj denove la ŝajnigo de kompleta najlo nepregis."

"La enigmo, ĝis tiu punkto, nun malenigmiĝis. La murdinto forfuĝis pere de la fenestro alfrontanta la liton. Falinte proprainstige post lia foriro (aŭ eble fermite laŭcele), ĝi refiksiĝis pere de la risorto. Kaj estis tiu perrisorta reteno kiun la polico malprave interpretis kiel pernajlan retenon. Daŭran tiurilatan enketadon tial oni juĝis ne plu bezoni."

"La venonta demando estis tiu de la descendorimedo. Tiuteme, mi kontentiĝis ĉirkaŭpromenante kun vi la konstruaĵon. Proksimume kvin futojn kaj duonon for de la koncerna fenestroklapo etendiĝis

fulmosuĉilo. Ekde tiu suĉilo maleblintus al iu ajn atingi la fenestron, des pli ĝin eniri. Mi rimarkis tamen ke la ŝutroj de la kvara etaĝo estis de tiu aparta speco kiujn Parizaj ĉarpentistoj nomas _ferrades_—speco malmulte uzata hodiaŭ sed ofte vidataj sur ege malnovaj domegoj de urboj Liono kaj Bordozo. Ili havas la formon de
ordinara pordo—simpla, ne faldebla pordo—krom tio ke la malsupra duono portas lignan kradaĵon aŭ pergolon, tiel disponigante bonegan mantenejon. Ĉe la koncerna konstruaĵo tiuj ŝutroj estas plene larĝaj je tri futoj kaj duono. Kiam ni vidis ilin de malantaŭ la domo, ambaŭ estis duonapertaj—tio estas, ili elstaris orte disde la muro. Verŝajnas ke la polico, same kiel mi, kontrolis la malantaŭaĵon de la apartamentaro. Tamen, sendube rigardante tiujn _ferrades_ laŭ la linio de ilia larĝeco (ne dubeblas ke ili tiel agis), ili ne perceptis
tiun grandan larĝecon mem aŭ almenaŭ ne ĝin konsideris ĝustavalore. Verfakte, sin konvinkinte ke nenia eliro efektivigeblis en tiu areo, ili
faris kompreneble nur ege supraĵan tiurilatan kontrolon."

"Klare estis al mi tamen ke la ŝutro apartenanta al la fenestro situanta ĉekape de la lito, se oni refaldus ĝin kontraŭmuren, atingus lokon nur du futojn for disde la fulmosuĉilo. Ankaŭ evidente estis ke, pere de la estigo de ege malkutima kvanto da agado kaj kuraĝo, oni povintus eniri la fenestron ekde la suĉilo. Etendinte la brakon distancon de du futoj kaj duono (ni nun imagu la ŝutron malfermitan plenlarĝe), ŝtelisto povintus enmanigi solide la lignokradaĵon. Tiam, liberiginte la alian manon de ĉirkaŭ la suĉilo, apoginte la piedojn sekure kontraŭ la muron kaj saltinte kuraĝe foren, li povintus
fermsvingi la ŝutron. Se la fenestro, ni supozu, estis malfermita en tiu momento, li povintus eĉ sin svingi en la ĉambron."

"Mi deziras ke vi retenu mense precipe tion: mi parolis pri _ege_ malkutima grado da agado kiel nepra antaŭbezono por sukcesigi tiel danĝeran kaj tiel malfacilan entreprenon. Estas mia celo komprenigi al vi, unue, tion ke la ago eble fareblis sed, due kaj ĉefe, mi deziras trudi al via kompreno la _ege eksterordinaran_, la preskaŭ preternaturan karakteron de la facilmoveco povinta ĝin plenumi."

"Vi diros, sendube, uzante la lingvaĵon de la jurisprudenco, ke, por starigi mian argumentaron, mi subtaksu anstataŭ plentaksi la agadon bezonitan en tiu afero. Tio povas esti la jurisprudenca kutimo, sed la rezono ne funkcias tiel. Mia fina celo estas nur la vero. Mia tuja celo estas vin konvinki apudigi tiun _ege malkutiman_ agadon kiun mi ĵus priparolis kaj tiun _ege strangan_ stridan (aŭ raŭkan) kaj _malkonstantan_ voĉon pri kies landodeveno nenia homparo kunkonsentis kaj en kies eldirado nenia silabado rekoneblis."

Instigite de tiuj vortoj, svaga kaj duonforma koncepto pri la voldiraĵo
de Dupino traflugetis mian menson. Mi spertis la senton situadi, sen komprenpovo, sur la rando de ekkomprenado. Same kiel homoj fojfoje sin
trovas sur la rando de rememorado sen, post ĉio, rememorpovo. Mia amiko
daŭrigis sian diskurson.

"Vi konscios," li diris, "ke mi anstataŭis la temon de elirrimedo per tiu de enirrimedo. Mi intencis komprenigi ke eniro kaj eliro efektiviĝis sammaniere, samloke. Ni nun revenu al la enaĵo de la ĉambro. Ni superrigardu la tieajn aspektojn. La tirkestoj de la ŝranko, laŭraporte, estis disrabitaj, kvankam restis en ili multaj vestaĵoj. La tiurilata konkludo estas absurda. Ĝi estas nura konjekto—kaj ege malbonsenca—nenio alia. Kiel ni eksciu ke la artikloj trovitaj en la tirkestoj ne estis ĉio kion la tirkestoj

origine entenis? S-rino Lespanajo kaj ŝia filino estigis ege izolitan vivadon, akceptis neniajn gastojn, malofte eliris en la urbon, malbezonis multajn vestoŝanĝaĵojn. La trovitaj vestaĵoj estis sendube tiel bonkvalitaj kiel aliaj povintaj aparteni al la sinjorinoj.
Se rabisto forprenis iujn, kial li ne forprenis la plej bonajn? Kial ne ĉiujn? Simplavorte, kial li postlasis kvar mil orajn frankojn por sin superŝarĝi per pako da tolaĵoj? La oron li _jes ja_ postlasis. Preskaŭ la tutan sumon menciitan de S-ro Minjodo, la bankisto, oni trovis surplanke, en sakoj."

"Mi deziras tial forigi el viaj pensadoj la eraregan _motiv_-teorion naskigitan en la cerboj de la policanoj per tiu parto de la indicaro parolanta pri mono liverita ĉe la domfordo. Koincidoj dekoble pli mirindaj ol tiu (livero de mono kaj murdo efektivigita al ties ricevinto
nur tri tagojn poste) ekestiĝas ĉe ni ĉiuj ĉiun horon de niaj vivoj sen sin atentigi eĉ momentdaŭre. Koincidoj ĝenerale estas faligiloj sur la vojo de tiu rango da pensantoj edukitaj sen instruado
pri stokastiko, tiu probabloteorio al kiu la plej gloraj studobjektoj de homa esplorado ŝuldas la plej gloran ilustradon. En la nuna kazo, se la oro malestintus, tio ke oni ĝin liveris nur tri tagojn antaŭe konsistigintus iom pli ol koincidon. Tio konfirmintus la motivteorion.
Tamen en la veraj cirkonstancoj de la kazo, se ni supozu oron la motivo
de la perfortaĵo, necesas ankaŭ juĝu la misfarinton hezitema idioto forlasinta kaj sian oron kaj sian motivon."

"Retenante nun konstante antaŭmense la konsiderindaĵojn kiujn mi atentigis al vi—tiun strangan voĉon, tiun malkutiman facilmovecon kaj tiun surprizan mankon de motivo por murdo tiel aparte abomena—ni enketu pri la buĉado mem. Jen virino mortigita per mana strangolado kaj
enŝovita en kamentubon kapon malsupren. Ordinaraj murdistoj ne utiligas
tian murdorimedon. Des malpli ili sin senigas tiamaniere je la murditoj.
En la maniero en kiu oni suprenŝovis la kadavron en la kamentubon, vi agnosku, estis io ekscese troigita—io nepre neakordigebla kun niaj kutimaj konceptoj pri homa agado, eĉ kiam ni supozu la aktorojn la plej
depravaciiĝintaj homoj. Konsciu ankaŭ kiel granda estis laŭnecese la fortiko povinta suprenŝovi la kadavron en tian aperturon tiel perforte ke la kunigita fortiko de pluraj homoj apenaŭ sufiĉis por ĝin _malsupren_-tiri."

"Ni konsideru nun ceterajn indikaĵojn pri la uzado de mirindega fortiko. Sur la fajrejo kuŝis dikaj bukloj—ege dikaj bukloj—da griza homhararo. Tiujn oni forŝiris ekde la radikoj. Vi konscias pri la granda fortiko bezonata por fortiri kune el la kapo eĉ dudek-tridek
harojn. Vi vidis same kiel mi la koncernajn buklojn. Iliaj radikoj (horora vidaĵo!) koaguliĝis kun eroj de kranihaŭto—nepra signo pri la enorma potenco aktivigita por elradikigi ununurgeste eble duonmilionon da haroj. La gorĝo de la maljunulino estis ne nur tranĉita. La kapo estis fortranĉita disde la korpo kvankam la tranĉilo estis ordinara razilo."

"Mi deziras ke vi konsideru ankaŭ la _brutan_ ferocon de tiuj agoj. Pri la ekimozoj sur la korpo de S-rino Lespanajo mi ne parolu. S-ro Dumaso kaj lia estimata koadjutoro S-ro Etjeno deklaris ke obtuza ilo ilin estigis kaj ĝis iu punkto la sinjoroj ege pravas. La obtuza ilo estis evidente la ŝtona pavimo de la korto sur kiun la viktimo falis el la fenestro alfrontanta la liton. Tiun veron, kiom ajn simpla ĝi

nun ŝajnu, la polico malkonstatis pro la sama kialo ke la larĝon de la fenestroŝutroj ili malagnoskis—ĉar, pro la najloafero, siajn perceptojn ili hermetikigis kontraŭ la eblo ke la fenestroj iam ajn malfermiĝis."

"Se nun, krom ĉiuj tiuj konsiderindaĵoj, vi ankaŭ primeditis ĝustavalore la strangan malbonordon de la ĉambro, ni nun sukcesis apudigi la jenajn temojn: surprizegan facilmovecon, preterhoman fortikon, brutalan ferocon, senmotivan buĉadon, _groteskon_ neprege fremdan al la tuta homaro pro ties hororo, kaj voĉon fremdatonan al la oreloj de viroj de multaj landoj kaj tute malplenan je ĉiu klara aŭ komprenebla silabado. Sekvas tial kiu rezulto? Sur vian imagkapablon mi imponis kiun instigon?"

Mi sentis ekvibraĉi mian karnon dum Dupino starigis la demandon. "Frenezulo," mi diris, "plenumis tiun faron. Iu delira maniulo, forfuĝinte el najbara sandomo."

"Laŭ iu vidpunkto," li respondis, "via ideo ne estas indiferenta. Tamen la voĉoj de frenezuloj, eĉ okaze de iliaj plej sovaĝaj paroksismoj, neniam akordas kun tiu stranga voĉo aŭdita surŝtupare. Frenezulo devenas de iu lando kaj lia lingvaĵo, kiom ajn malkohera ĉe la nivelo de siaj vortoj, havas ĉiam koheron de silabado. Aldone, la hararo de frenezulo ne similas tion kion mi nun tenas enmane. Mi malimplikis tiun etan tufon el la rigide kroĉintaj fingroj de S-rino Lespanajo. Diru al mi kiel vi ĝin interpretas."

"Dupino!" mi diris, nepre sennervigite. "Tiu hararo ege strangas. Ĝi neniel estas _homa_ hararo."

"Mi ne asertis kontraŭe," li diris, "sed antaŭ ol determini tiun punkton, mi petas ke vi ekrigardu la etan krokizon kiun mi desegnis sur ĉi-tiun folion. Ĝi estas _faksimila_ desegnaĵo pri tio kion oni priskribis en unu parto el la atestaĵaro kiel 'malhelajn ekimozojn kaj profundajn ungokaŭzitajn noĉojn' surestantajn la gorĝon de Fraŭlino Lespanajo kaj en alia parto (tiu de S-roj Dumaso kaj Etjeno) kiel 'sinsekvon da lividaj makuloj, verŝajne fingropremaĵoj.'"

"Vi perceptos," daŭrigis mia amiko, dissternante la folion sur la tablon antaŭ ni, "ke ĉi-tiu desegnaĵo pensigas pri solida kaj fiksita teno. Evidentas nenia _glitado_. Ĉiu fingro retenis—eble ĝis la morto de la viktimo—la timigan alprenon per kiu ĝi origine sin enfiksis. Nun, klopodu meti viajn fingrojn ĉiujn, sammomente, en la respektivajn premsignojn tiel kiel vi ilin vidas."

Mi entreprenis sensukcese plenumi la peton.

"Eble ni ne traktas tiun aferon juste," li diris. "La folio estas sternita sur ebena surfaco sed la homa gorĝo estas cilindra. Jen lignoŝtipo kies cirkonferenco egalas proksimume tiun de la gorĝo. Volvu la desegnaĵon ĉirkaŭ ĝi kaj refaru la eksperimenton."

Mi tiel agis sed la malfacilaĵo evidentis eĉ pli ol antaŭe. "Ĉi-tiu," mi diris, "estas la marko de nenia homa mano."

"Nun legu," respondis Dupino, "ĉi-tiun ekstrakton el Kuvjero."

Ĝi estis detala anatomia kaj ĝenerale priskriba raporto pri la granda flavbruna orangutano de Indoneziaj Insuloj. La gigantan staturon, la mirigajn fortikon kaj agadon, la sovaĝan ferocon kaj la imitkapablojn

de tiuj mamuloj ĉiuj konas sufiĉe bone. Tuj mi ekkomprenis la plenajn hororojn de la murdoj.

"La priskribo pri la fingroj," mi diris, finleginte la ekstrakton, "akordas ekzakte kun la desegnaĵo. Mi konscias ke nenia besto krom orangutano de la ĉi-tie menciita specio povintus premi la noĉojn tiel kiel vi ilin desegnis. Aldone ĉi-tiu flavbruna hartufo havas la saman karakteron kiel tiu de la besto de Kuvjero. Tamen mi nepre ne scipovas
kompreni la apartajn detalojn de tiu timiga mistero. Krome, _du_ voĉoj
aŭdiĝis en kverelado kaj unu el ili estis sendispute tiu de Franco."

"Prave! Kaj vi memoros dirаĵon atribuitan preskaŭ unuanime al tiu voĉo—la dirаĵon '_mon Dieu_.' Ĉi-tiun, en la koncernaj cirkonstancoj, unu el la atestintoj (Montano, la frandaĵisto) identigis
kiel dirаĵon de protesto aŭ malaprobo. Ĉefe sur tiuj du vortoj tial mi bazis miajn esperojn atingi plenan solvon pri la enigmo. Iu Franco konsciis pri la murdo. Eblas—efektive, ege pli ol eblas—ke tute senkulpe li ne partoprenis en la sanga evento kiu okazis. Eblas ke la orangutano eskapis de li. Eblas ke li ĝin spuris ĝis la ĉambro sed, en la rezultintaj maltrankviligaj cirkonstancoj, neniam povintus ĝin rekapti. Ĝi daŭre ĉirkaŭvagadas libere."

"Mi ne daŭrigos tiujn konjektojn—alie mi ne rajtas ilin nomi—ĉar la ombra reflektado sur kiu ili baziĝas estas apenaŭ sufiĉe profunda por ke mia intelekto ilin agnosku kaj ĉar mi ne scipovus komprenebligi
ilin al la intelekto de aliulo. Ni nomu ilin tial konjektoj kaj ilin aludas tiel. Se la koncerna Franco laŭ mia supozo jes ja senkulpas pri
tiu abomenaĵo, ĉi-tiu reklamo, kiun hieraŭnokte post nia hejmenreveno mi liveris al la oficejo de _La Mondo_ (ĵurnalo pritraktanta ŝipajn aferojn kaj multe legata de maristoj) alvenigos lin al nia loĝejo."

Li transdonis al mi paperfolion kaj mi legis la jenon:

> _"KAPTITA. En Bulonjo-Arbaro frumatene en ....._ (la dato de la murdo) _grandega flavbruna orangutano de Bornea specio. La posedanto (kiu laŭkonstate estas maristo deĵoranta sur Malta ŝipo) rajtas repreni la beston post ĝin identigi taŭgadetale kaj pagi kelkajn kostojn estigitajn per ĝiaj kapto kaj retenado.
> Venu al numero ..... strato ..... Sankta-Ĝermano-Kvartalo ..... tria etaĝo."_

"Kiel eblis al vi," mi diris, "ekscii ke la viro estas maristo kaj apartenas al Malta ŝipo?"

"Mi _ne_ scias tion," diris Dupino. "Mi ne _certas_ pri tio. Jen tamen
eta rubandero kiu, laŭ ties formo kaj grasa aspekto, funkciis por kunligi la hararon en unu el tiuj longaj plektaĵoj kiun tiom ŝatas maristoj. Aldone, ĉi-tiu nodo estas unu kiun nur malmultaj homoj krom maristoj scipovas estigi kaj kiu propras al la Maltanoj. Mi alprenis la
rubandon ĉe la bazo de la fulmosuĉilo. Ĝi ne povintus aparteni al iu ajn el la du mortintoj."

"Se nun, malgraŭ ĉio, mi eraras en miaj induktoj pri tiu rubando, tio estas, ke la Franco estas maristo deĵoranta sur Malta ŝipo, mi nenion difektis dirante tion en la reklamo. Se mi eraras, li nur supozos ke min
devojigis iu cirkonstanco pri kiu li ne penados enketi. Se mi pravas tamen, granda avantaĝo atingiĝas. Konsciante pri la murdoj, tamen

senkulpa tiurilate, kompreneble la Franco hezitos alrespondi la reklamon
kaj postuli la rehavigon de la orangutano."

"Li rezonos tiumaniere. 'Mi estas senkulpa. Mi estas malriĉa. Mia orangutano altvaloras—al homo situanta en miaj cirkonstancoj, vera fortuno en si. Kial maldisponigi min pri ĝi pro senkaŭzaj timoj pri danĝero? Jen ĝi estas, preta al mia manpreno. Ĝi malkovriĝis en Bulonjo-Arbaro, ĉe fora distanco disde la buĉadsceno. Kiel oni povus iam suspekti ke bruta besto efektivigis la misfaron? La polico kulpas.
Ili malsukcesis malkovri la plej malgrandan indicon. Eĉ se ili spurus la beston, ne eblus al ili pruvi mian konscion pri la murdo aŭ kulpigi
min pro tiu konscio."

"'Antaŭ ĉio, oni _jes ja_ min konas. La reklaminto min nomumas posedanto de la besto. Mi ne certas ĝis kiu limo povas etendiĝi lia scio. Se mi malkonsentas depostuli havaĵon de tiel alta valoro kaj kiun
oni scias ke mi posedas, mi suspektigos almenaŭ la simion. Mi kutimas atentigi nek min nek la beston. Mi respondos al la reklamo, rehavos la
orangutanon kaj ĝin zorge retenos ĝis kiam forblovumos tiu afero.'"

En tiu momento ni aŭdis paŝon sur la ŝtuparo.

"Pretigu viajn pistolojn," diris Dupino. "Tamen nek uzu nek vidigu ilin
antaŭ signalo de mi."

La ĉefpordon de la domo ni antaŭe postlasis en malfermado kaj la vizitanto, jam enirinte sen sonigi, antaŭenvenis plurajn paŝojn
sur la ŝtuparo. Nun tamen li ŝajnis heziti. Baldaŭ ni aŭdis lin descendi. Dupino jam moviĝis pordodirekten kiam denove ni aŭdis lin suprenvenadi. Li ne forturniĝis duan fojon sed alproksimiĝis rezolute kaj frapsonigis la pordon de nia ĉambro.

"Eniru!" diris Dupino feliĉ- kaj bonkorvoĉe.

Viro eniris. Li estis maristo, evidente—alta, solida, muskola persono havanta iom ĉioriskulan, tute ne senĉarman mienon. Lian vizaĝon, ege sunbruligitan, barbo kaj lipharoj pli ol duone kaŝis. Li kunportis grandan kverkan klabon, sed ŝajnis alie senarmila. Li riverencis malgracie kaj diris al ni "Bonan vesperon" kun Franca parolmaniero kiu,
kvankam iom pensiganta pri Novkastelo, aŭdigis rekoneblan Parizan ekdevenon.

"Bonvolu sidiĝi, mia amiko," diris Dupino. "Ĉu mi rajtas supozi ke vi alvenas rilate al la orangutano? Honestavorte, mi preskaŭ envias vian posedrajton pri ĝi: mirinde bonega kaj sendube altvalora besto. Kiom aĝa vi taksas ĝin?"

La maristo ensuĉis longan spiradon, en la maniero de homo ĵus formetinta netolereblan ŝarĝon, kaj tiam respondis sekuravoĉe:

"Mi havas nenian kalkulrimedon. Tamen ĝi ne povas esti pli ol kvar-kvinjara. Ĉu vi ĝin retenas ĉi-tie?"

"Ho, ne! Ĉi-tie ni ne disponas pri konvenan retenujon. Ĝi sidas en proksima lustablo de Duburgo-Strato. Vi povos rehavi ĝin morgaŭmatene.
Kompreneble, vi pretas identigi la posedaĵon, ĉu ne?"

"Kompreneble, sinjoro. Mi pretas."

"Bedaŭrinde estos devi min senhavigi je ĝi," diris Dupino.

"Mi tute ne atendas ke vi estu prizorginta ĝin senpage, sinjoro," diris
la viro. "Ne rajtas esperi tion. Tre bonvolas pagi rekompencon kontraŭ
la malkovro de la besto—tio estas, konvenan rekompencon."

"Nu," respondis mia amiko. "Ĉio tio tre justas, certe. Mi pripensu!
Kion necesos al mi ekhavi? Ho! Mi diru al vi. Jen estos mia rekompenco.
Vi transsciigos al mi ĉiujn laŭeblajn informaĵojn pri tiuj murdoj
okazintaj en Kadavrejo-Strato."

Dupino eldiris tiujn lastajn vortojn en tre malalta, tre trankvila tono.
Egale trankvile li aliris la pordon, ĝin ŝlosis, metis la ŝlosilon en
la poŝon. Tiam li tiris pistolon el sia brusto, metis la armilon sen la
plej eta agitiĝo sur la tablon.

La vizaĝo de la maristo ekruĝiĝis, kvazaŭ li luktus kontraŭ
sufokiĝo. Li stariĝis eksalte, alprenis sian klabon. Tamen en la
sekvinta momento li refalis sur sian seĝon, tremegante kaj elmontrante
survizaĝe kvazaŭ la maskon de Morto mem. Nenian vorton li eldiris. Mi
lin kompatis plenkore.

"Mia amiko," diris Dupino afablavoĉe, "vi maltrankviligas vin
senbezone. Jes ja, verfakte. Ni nepre malcelas noci vin. Mi promesas al
vi, honestavorte de sinjoro kaj de Franco, ke ni neniel intencas vin
difekti. Mi scias kun nepra certeco ke vi senkulpas pri la abomenaĵoj
de Kadavrejo-Strato. Ne decos nei tamen vian ioman implikiĝon en ili.
Laŭ tio kion mi jam diris, vi devas konscii ke, rilate al tiu afero, mi
disponis pri informrimedoj kiujn vi neniam povintus imagi."

"Nu, jen la situacio. Vi faris nenion eviteblan—nenion certe povantan
vin kulpigi. Vi senkulpis eĉ pri ŝtelado en momento kiam vi povintus
ŝteli senpune. Vi havas nenion kaŝendan. Vi havas nenian kialon
ion kaŝi. Aliflanke, ĉiu honorprincipo vin devigas konfesi vian
tutan tiurilatan sciadon. Nun sidas en malliberejo senkulpulo al kiu
imputiĝis krimo kies farinton vi scipovas identigi."

La maristo jam sin reregis egagrade dum Dupino eldiris tiujn vortojn;
tamen nun entute malaperis lia antaŭa kondutaŭdaco.

"Dio helpu min!" li diris post mallonga paŭzo. "Mi jes ja sciigos al
vi ĉion kion mi scias pri tiu-ĉi afero. Sed mi ne atendas ke vi kredu
duonon el mia dirado. Se mi tion atendus, mi estus efektive stultulo.
Ĉiomalgraŭe, senkulpa mi estas, kaj mi plene konfesos eĉ devonte
morti pro tio."

Sekvas esencadetale tio kion li raportis.

Li vojaĝis lastatempe en Indonezia Insularo. Bando, al kiu li aniĝis,
alteriĝis en Borneo kaj faris interninsulan distriĝekskurson. Li
kaj kunekskursinto kaptis la orangutanon. Lia kunulo mortis kaj la
besto fariĝis lia aparta posedaĵo. Post multe da ĝeno, okazigita
per la nebridebla feroco de lia kaptito dum la hejmenrevena vojaĝo,
li sukcesis finfine loĝigi ĝin sekure ĉe si en Parizo. Tie, por ne
altiri al si la malplaĉan scivolemon de siaj najbaroj, li retenis la
beston en prizorgata sekureco ĝis kiam tiu resaniĝus de piedvundo
kaŭzita de surŝipe ricevita splito. Lia fina celo estis vendi la

simion.

Hejmenreveninte de iu marista kapriolado la nokton, aŭ pli ĝuste la matenon de la murdoj, li trovis la beston enloĝantan lian propran dormĉambron en kiun ĝi eskapis el apuda kamero kie ĝi estis, laŭ la supozo de la maristo, sekure malliberigita. Tenante razilon enmane, plene ŝaŭmsapite, ĝi sidis antaŭ la spegulo, entreprenante sin razi, procedo kiun antaŭe, sendube, tra la kamera ŝlosiltruo, ĝi vidis plenumi la mastron.

Ekvidinte tiel ferocan kaj tiel imitpovan beston posedi armilon tiel danĝeran, dum kelkaj momentoj, terurite, la maristo ne sciis kion fari. Li jam kutimis pacigi la beston tamen, eĉ okaze de ĝiaj plej ferocaj humoroj, per vipo, kaj tiun li nun utiligis. Vidinte la vipon, la orangutano trairis eksalte la ĉambropordon, kuris malsupren laŭ la ŝtuparo kaj de tie, pere de fenestro bedaŭrinde malfermita, eniris la straton.

La Franco postsekvis malespere. La simio, ankoraŭ tenante enmane la razilon, haltis fojfoje por rigardi malantaŭen kaj gestadi al sia postkuranto ĝis kiam tiulasta preskaŭ atingis ĝin. Tiam ĝi foriris denove. Tiel-ĉi la ĉaso daŭris longan tempon. La stratoj nepre silentis ĉar estis preskaŭ la tria horo de la mateno.

Laŭpasante strateton malantaŭ Kadavrejo-Strato, la fuĝinto ekvidis lumon brilantan tra la malfermita fenestro de la ĉambro de S-rino Lespanajo en la kvara etaĝo de ŝia domo. Hastante al la konstruaĵo, ĝi perceptis la fulmsuĉilon, suprengrimpis laŭ ĝi kun nekonceptebla facilmovo, alprenis la ŝutron, kiu estis ĵetita entute kontraŭ la muron, kaj pere de tiu sin svingis plendistance sur la kaptabulon de la lito. La tuta agadaro efektiviĝis en malpli ol unu minuto. La ŝutron la orangutano remalfermis piedbate enirante la ĉambron.

La maristo intertempe kaj ĝojiĝis kaj konsterniĝis. Nun li ege esperis povi rekapti la bruton ĉar ĝi apenaŭ povos eskapi el la kaptejo en kiun ĝi ĵus eniris krom pere de la suĉilo, ĉe la malsupro de kiu la posedanto povus rehavi ĝin. Aliflanke li multe pritimis kion povus fari la simio en la domo. Tiu lasta pensado instigis la viron daŭre postsekvi la fuĝinton. Fulmsuĉilon oni povas facile laŭgrimpi, precipe maristo. Kiam li atingis tamen la nivelon de la fenestro, kiu situis malproksime maldekstre, lia suprenirado ĉesis. Ĉio kion li povis fari estis kliniĝi maldekstren por iom ekvidi la internon de la ĉambro. Tiu ekvido preskaŭ faligis lin de sur la suĉilo pro troigo da hororo.

En tiu momento interrompis la nokton tiuj aĉaj ŝirkriegoj ekmaldormigintaj la loĝantojn de Kadavrejo-Strato. Sinjorino Lespanajo kaj ŝia filino, surportante dormvestaĵojn, verŝajne priokupiĝis aranĝante dokumentojn en la jam menciita ferkofro antaŭe rulita en la mezon de la ĉambro. Ĝi estis malfermita kaj ties enhavaĵoj kuŝis apude sur la planko. Devas esti ke la viktimoj sidis malalfrontante la fenestron kaj, juĝante laŭ la eta tempodaŭro forpasinta inter la eniro de la besto kaj iliaj ŝirkriegoj, oni rajtas supozi ke ili ne tuj ĝin ekvidis. La klaksonon de la ŝutro ili atribuintus kompreneble al la vento.

Kiam la maristo enrigardis, la bestego jam alprenis Sinjorinon Lespanajon per la hararo (kiu estis malfiksa ĉar ŝi kombis ĝin) kaj svingis la razilon antaŭ ŝia vizaĝo, imitante barbirajn gestojn. La

filino kuŝis sternite kaj senmove, sveninte. La kriegoj kaj baraktoj de la maljunulino (dum kiuj la hararo estis forŝirita de sur ŝia kapo) finagis ŝanĝante la verŝajne pacajn celojn de la orangutano en kolerajn entreprenojn. Per unu rezoluta svingo de sia muskola brako ĝi preskaŭ fortranĉis ŝian kapon disde ŝia korpo. Kiam la besto ekvidis sangon, ĝia kolero pligrandiĝis en deliron. Grincigante la dentojn, flagrigante kvazaŭan fajron el la okuloj, ĝi atakis la korpon de la fraŭlino, enfiksis siajn timigajn ungegojn en ŝian gorĝon, ilin retenis tie ĝis kiam ŝi mortis.

Ĝiaj nomadaj kaj sovaĝaj rigardoj atingis en tiu momento la kapon de la lito super kiu nun videblis la vizaĝo de ĝia mastro, rigida pro hororo. La frenezo de la besto, kiu sendube daŭre memoris la teruran vipon, tujege ŝanĝiĝis en timegon. Nun prikonsciante sian punindan kulpon, ĝi ŝajnis deziri kaŝi siajn sangajn farojn kaj saltetis ĉirkaŭ la ĉambro en krizo de nervoza ekscitiĝo, faligante kaj rompante la meblojn survoje, fortrenante la liton de sur ties kadro. Rakontofine, ĝi ekprenis unue la kadavron de la filino, suprenŝovis ĝin en la kamentubon kie ĝi poste malkovriĝis, tiam tiun de la maljunulino kiun ĝi tuj forlanĉis kapon antaŭen tra la fenestro.

Dum la simio alproksimiĝis la fenestroklapon kun sia mutilita ŝarĝo, la maristo kaŭris ŝokite sur la suĉilo kaj malsuprenglitante (ne grimpante) laŭ ĝia longo, revenis haste hejmen, timegante la sekvojn de la buĉado kaj ĝoje rezignante, en sia teruro, ĉiun zorgon pri la sorto de la orangutano. La vortoj aŭditaj de la homoj sur la ŝtuparo estis la horor-kaj-timplenaj ekkrioj de la Franco intermiksitaj kun la demona babilaĉado de la bruto.

Mi havas preskaŭ nenion por aldoni. Devas esti ke la orangutano eskapis el la ĉambro pere de la suĉilo ĵus antaŭ ol oni enrompis la pordon. Ĝi fermis la fenestron sendube ĝin trapasante. Kaptis ĝin poste la posedanto mem kiu vendis ĝin kontraŭ altega monsumo ĉe Botanik-Ĝardeno (kiu ampleksas la Parizan bestoĝardenon). Lebonon oni tuj liberigis post nia rakonto pri la cirkonstancoj (kun kelkaj komentoj de Dupino) ĉe la buroo de Polica-Prefekto. Tiu funkciulo, kvankam tre plaĉis al li mia amiko, ne sukcesis kaŝi sian ĉagrenon pri la evoluturniĝo de la afero kaj sin permesis iom sarkasmiĝi pri la socia maldeco de homoj malbonvolantaj atenti siajn proprajn aferojn.

"Li parolu," diris Dupino, opiniante ke ne necesas respondi. "Li diskursu. Tio senzorgigos lian konsciencon. Sufiĉas al mi esti venkinta lin en lia propra kastelo. Tamen, ke li malsukcesis solvi tiun misteron ne estas mirindaĵo kiel li supozas, ĉar verfakte nia amiko prefekto estas tro ruza por esti profunda. Lia saĝeco havas nenian daŭrokapablon. Ĝi estas entute kapo kaj neniel korpo, tiel kiel ni vidas en bildoj pri Deino Laverno, aŭ, pli bone, entute kapo kaj ŝultroj, same kiel gadfiŝo. Sed li estas bona estaĵo, finfine. Li plaĉas al mi precipe pro majstra ĵargonmanovro per kiu li akiris sian famon kiel geniulo. Mi volas diri lia maniero _de nier ce qui est, et d'expliquer ce qui n'est pas_ (nei tion kio estas kaj klarigi tion kio ne estas)."

End of Project Gutenberg's La Murdoj de Kadavrejo-Strato, by Edgar Allan Poe

*** END OF THIS PROJECT GUTENBERG EBOOK LA MURDOJ DE KADAVREJO-STRATO ***

***** This file should be named 18326-0.txt or 18326-0.zip *****
This and all associated files of various formats will be found in:
http://www.gutenberg.org/1/8/3/2/18326/

Produced by Robert L. Read, William Patterson and the
Online Distributed Proofreading Team at http://www.pgdp.net

Updated editions will replace the previous one--the old editions will be renamed.

Creating the works from public domain print editions means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg-tm electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG-tm concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for the eBooks, unless you receive specific permission. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the rules is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. They may be modified and printed and given away--you may do practically ANYTHING with public domain eBooks. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

*** START: FULL LICENSE ***

THE FULL PROJECT GUTENBERG LICENSE
PLEASE READ THIS BEFORE YOU DISTRIBUTE OR USE THIS WORK

To protect the Project Gutenberg-tm mission of promoting the free distribution of electronic works, by using or distributing this work (or any other work associated in any way with the phrase "Project Gutenberg"), you agree to comply with all the terms of the Full Project Gutenberg-tm License (available with this file or online at http://gutenberg.org/license).

Section 1. General Terms of Use and Redistributing Project Gutenberg-tm electronic works

1.A. By reading or using any part of this Project Gutenberg-tm electronic work, you indicate that you have read, understand, agree to and accept all the terms of this license and intellectual property (trademark/copyright) agreement. If you do not agree to abide by all the terms of this agreement, you must cease using and return or destroy all copies of Project Gutenberg-tm electronic works in your possession.
If you paid a fee for obtaining a copy of or access to a Project Gutenberg-tm electronic work and you do not agree to be bound by the terms of this agreement, you may obtain a refund from the person or

entity to whom you paid the fee as set forth in paragraph 1.E.8.

1.B. "Project Gutenberg" is a registered trademark. It may only be used on or associated in any way with an electronic work by people who
agree to be bound by the terms of this agreement. There are a few things that you can do with most Project Gutenberg-tm electronic works
even without complying with the full terms of this agreement. See paragraph 1.C below. There are a lot of things you can do with Project
Gutenberg-tm electronic works if you follow the terms of this agreement
and help preserve free future access to Project Gutenberg-tm electronic
works. See paragraph 1.E below.

1.C. The Project Gutenberg Literary Archive Foundation ("the Foundation"
or PGLAF), owns a compilation copyright in the collection of Project Gutenberg-tm electronic works. Nearly all the individual works in the
collection are in the public domain in the United States. If an individual work is in the public domain in the United States and you are
located in the United States, we do not claim a right to prevent you from
copying, distributing, performing, displaying or creating derivative works based on the work as long as all references to Project Gutenberg
are removed. Of course, we hope that you will support the Project Gutenberg-tm mission of promoting free access to electronic works by freely sharing Project Gutenberg-tm works in compliance with the terms of
this agreement for keeping the Project Gutenberg-tm name associated with
the work. You can easily comply with the terms of this agreement by keeping this work in the same format with its attached full Project Gutenberg-tm License when you share it without charge with others.

1.D. The copyright laws of the place where you are located also govern
what you can do with this work. Copyright laws in most countries are in
a constant state of change. If you are outside the United States, check
the laws of your country in addition to the terms of this agreement before downloading, copying, displaying, performing, distributing or creating derivative works based on this work or any other Project Gutenberg-tm work. The Foundation makes no representations concerning
the copyright status of any work in any country outside the United States.

1.E. Unless you have removed all references to Project Gutenberg:

1.E.1. The following sentence, with active links to, or other immediate
access to, the full Project Gutenberg-tm License must appear prominently
whenever any copy of a Project Gutenberg-tm work (any work on which the
phrase "Project Gutenberg" appears, or with which the phrase "Project Gutenberg" is associated) is accessed, displayed, performed, viewed, copied or distributed:

This eBook is for the use of anyone anywhere at no cost and with
almost no restrictions whatsoever.  You may copy it, give it away or
re-use it under the terms of the Project Gutenberg License included
with this eBook or online at www.gutenberg.org

1.E.2.  If an individual Project Gutenberg-tm electronic work is
derived
from the public domain (does not contain a notice indicating that it
is
posted with permission of the copyright holder), the work can be
copied
and distributed to anyone in the United States without paying any
fees
or charges.  If you are redistributing or providing access to a work
with the phrase "Project Gutenberg" associated with or appearing on
the
work, you must comply either with the requirements of paragraphs
1.E.1
through 1.E.7 or obtain permission for the use of the work and the
Project Gutenberg-tm trademark as set forth in paragraphs 1.E.8 or
1.E.9.

1.E.3.  If an individual Project Gutenberg-tm electronic work is
posted
with the permission of the copyright holder, your use and
distribution
must comply with both paragraphs 1.E.1 through 1.E.7 and any
additional
terms imposed by the copyright holder.  Additional terms will be
linked
to the Project Gutenberg-tm License for all works posted with the
permission of the copyright holder found at the beginning of this
work.

1.E.4.  Do not unlink or detach or remove the full Project Gutenberg-
tm
License terms from this work, or any files containing a part of this
work or any other work associated with Project Gutenberg-tm.

1.E.5.  Do not copy, display, perform, distribute or redistribute
this
electronic work, or any part of this electronic work, without
prominently displaying the sentence set forth in paragraph 1.E.1 with
active links or immediate access to the full terms of the Project
Gutenberg-tm License.

1.E.6.  You may convert to and distribute this work in any binary,
compressed, marked up, nonproprietary or proprietary form, including
any
word processing or hypertext form.  However, if you provide access to
or
distribute copies of a Project Gutenberg-tm work in a format other
than
"Plain Vanilla ASCII" or other format used in the official version
posted on the official Project Gutenberg-tm web site
(www.gutenberg.org),
you must, at no additional cost, fee or expense to the user, provide
a
copy, a means of exporting a copy, or a means of obtaining a copy
upon
request, of the work in its original "Plain Vanilla ASCII" or other
form.  Any alternate format must include the full Project Gutenberg-
tm
License as specified in paragraph 1.E.1.

1.E.7.  Do not charge a fee for access to, viewing, displaying,

performing, copying or distributing any Project Gutenberg-tm works unless you comply with paragraph 1.E.8 or 1.E.9.

1.E.8. You may charge a reasonable fee for copies of or providing access to or distributing Project Gutenberg-tm electronic works provided that

- You pay a royalty fee of 20% of the gross profits you derive from the use of Project Gutenberg-tm works calculated using the method you already use to calculate your applicable taxes. The fee is owed to the owner of the Project Gutenberg-tm trademark, but he has agreed to donate royalties under this paragraph to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation. Royalty payments must be paid within 60 days following each date on which you prepare (or are legally required to prepare) your periodic tax returns. Royalty payments should be clearly marked as such and sent to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation at the address specified in Section 4, "Information about donations to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation."

- You provide a full refund of any money paid by a user who notifies you in writing (or by e-mail) within 30 days of receipt that s/he does not agree to the terms of the full Project Gutenberg-tm License. You must require such a user to return or destroy all copies of the works possessed in a physical medium and discontinue all use of and all access to other copies of Project Gutenberg-tm works.

- You provid□, in accordance with paragraph 1.F.3, a full refund of any money paid for a work or a replacement copy, if a defect in the electronic work is discovered and reported to you within 90 days of receipt of the work.

- You comply with all other terms of this agreement for free distribution of Project Gutenberg-tm works.

1.E.9. If you wish to charge a fee or distribute a Project Gutenberg-tm electronic work or group of works on different terms than are set forth in this agreement, you must obtain permission in writing from both the Project Gutenberg Literary Archive Foundation and Michael Hart, the owner of the Project Gutenberg-tm trademark. Contact the Foundation as set forth in Section 3 below.

1.F.

1.F.1. Project Gutenberg volunteers and employees expend considerable effort to identify, do copyright research on, transcribe and proofread public domain works in creating the Project Gutenberg-tm collection. Despite these efforts, Project Gutenberg-tm electronic works, and the medium on which they may be stored, may contain "Defects," such as, but not limited to, incomplete, inaccurate or corrupt data, transcription errors, a copyright or other intellectual property infringement, a defective or damaged disk or other medium, a computer virus, or computer codes that damage or cannot be read by your equipment.

1.F.2. LIMITED WARRANTY, DISCLAIMER OF DAMAGES - Except for the "Right of Replacement or Refund" described in paragraph 1.F.3, the Project

Gutenberg Literary Archive Foundation, the owner of the Project Gutenberg-tm trademark, and any other party distributing a Project Gutenberg-tm electronic work under this agreement, disclaim all liability to you for damages, costs and expenses, including legal fees. YOU AGREE THAT YOU HAVE NO REMEDIES FOR NEGLIGENCE, STRICT LIABILITY, BREACH OF WARRANTY OR BREACH OF CONTRACT EXCEPT THOSE PROVIDED IN PARAGRAPH F3. YOU AGREE THAT THE FOUNDATION, THE TRADEMARK OWNER, AND ANY DISTRIBUTOR UNDER THIS AGREEMENT WILL NOT BE LIABLE TO YOU FOR ACTUAL, DIRECT, INDIRECT, CONSEQUENTIAL, PUNITIVE OR INCIDENTAL DAMAGES EVEN IF YOU GIVE NOTICE OF THE POSSIBILITY OF SUCH DAMAGE.

1.F.3. LIMITED RIGHT OF REPLACEMENT OR REFUND - If you discover a defect in this electronic work within 90 days of receiving it, you can receive a refund of the money (if any) you paid for it by sending a written explanation to the person you received the work from. If you received the work on a physical medium, you must return the medium with your written explanation. The person or entity that provided you with the defective work may elect to provide a replacement copy in lieu of a refund. If you received the work electronically, the person or entity providing it to you may choose to give you a second opportunity to receive the work electronically in lieu of a refund. If the second copy is also defective, you may demand a refund in writing without further opportunities to fix the problem.

1.F.4. Except for the limited right of replacement or refund set forth in paragraph 1.F.3, this work is provided to you 'AS-IS' WITH NO OTHER WARRANTIES OF ANY KIND, EXPRESS OR IMPLIED, INCLUDING BUT NOT LIMITED TO WARRANTIES OF MERCHANTIBILITY OR FITNESS FOR ANY PURPOSE.

1.F.5. Some states do not allow disclaimers of certain implied warranties or the exclusion or limitation of certain types of damages. If any disclaimer or limitation set forth in this agreement violates the law of the state applicable to this agreement, the agreement shall be interpreted to make the maximum disclaimer or limitation permitted by the applicable state law. The invalidity or unenforceability of any provision of this agreement shall not void the remaining provisions.

1.F.6. INDEMNITY - You agree to indemnify and hold the Foundation, the trademark owner, any agent or employee of the Foundation, anyone providing copies of Project Gutenberg-tm electronic works in accordance with this agreement, and any volunteers associated with the production, promo□ion and distribution of Project Gutenberg-tm electronic works, harmless from all liability, costs and expenses, including legal fees, that arise directly or indirectly from any of the following which you do or cause to occur: (a) distribution of this or any Project Gutenberg-tm work, (b) alteration, modification, or additions or deletions to any Project Gutenberg-tm work, and (c) any Defect you cause.

Section  2.  Information about the Mission of Project Gutenberg-tm

Project Gutenberg-tm is synonymous with the free distribution of electronic works in formats readable by the widest variety of computers
including obsolete, old, middle-aged and new computers.  It exists because of the efforts of hundreds of volunteers and donations from people in all walks of life.

Volunteers and financial support to provide volunteers with the assistance they need, is critical to reaching Project Gutenberg-tm's goals and ensuring that the Project Gutenberg-tm collection will remain freely available for generations to come.  In 2001, the Project
Gutenberg Literary Archive Foundation was created to provide a secure and permanent future for Project Gutenberg-tm and future generations. To learn more about the Project Gutenberg Literary Archive Foundation and how your efforts and donations can help, see Sections 3 and 4 and the Foundation web page at http://www.pglaf.org.

Section 3.  Information about the Project Gutenberg Literary Archive Foundation

The Project Gutenberg Literary Archive Foundation is a non profit 501(c)(3) educational corporation organized under the laws of the state of Mississippi and granted tax exempt status by the Internal Revenue Service.  The Foundation's EIN or federal tax identification number is 64-6221541.  Its 501(c)(3) letter is posted at http://pglaf.org/fundraising.  Contributions to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation are tax deductible to the full extent permitted by U.S. federal laws and your state's laws.

The Foundation's principal office is located at 4557 Melan Dr. S. Fairbanks, AK, 99712., but its volunteers and employees are scattered throughout numerous locations.  Its business office is located at 809 North 1500 West, Salt Lake City, UT 84116, (801) 596-1887, email business@pglaf.org.  Email contact links and up to date contact information can be found at the Foundation's web site and official page at http://pglaf.org

For additional contact information:
Dr. Gregory B. Newby
Chief Executive and Director
gbnewby@pglaf.org

Section 4.  Information about Donations to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation

Project Gutenberg-tm depends upon and cannot survive without wide spread public support and donations to carry out its mission of increasing the number of public domain and licensed works that can be freely distributed in machine readable form accessible by the widest array of equipment including outdated equipment.  Many small donations
($1 to $5,000) are particularly important to maintaining tax exempt status with the IRS.

The Foundation is committed to complying with the laws regulating charities and charitable donations in all 50 states of the United States.  Compliance requirements are not uniform and it takes a considerable effort, much paperwork and many fees to meet and keep up with these requirements.  We do not solicit donations in locations

where we have not received written confirmation of compliance. To SEND DONATIONS or determine the status of compliance for any particular state visit http://pglaf.org

While we cannot and do not solicit contributions from states where we have not met the solicitation requirements, we know of no prohibition against accepting unsolicited donations from donors in such states who approach us with offers to donate.

International donations are gratefully accepted, but we cannot make any statements concerning tax treatment of donations received from outside the United States. U.S. laws alone swamp our small staff.

Please check the Project Gutenberg Web pages for current donation methods and addresses. Donations are accepted in a number of other ways including checks, online payments and credit card donations. To donate, please visit: http://pglaf.org/donate

Section 5. General Information About Project Gutenberg-tm electronic works.

Professor Michael S. Hart is the originator of the Project Gutenberg-tm concept of a library of electronic works that could be freely shared with anyone. For thirty years, he produced and distributed Project Gutenberg-tm eBooks with only a loose network of volunteer support.

Project Gutenberg-tm eBooks are often created from several printed editions, all of which are confirmed as Public Domain in the U.S. unless a copyright notice is included. Thus, we do not necessarily keep eBooks in compliance with any particular paper edition.

Most people start at our Web site which has the main PG search facility:

http://www.gutenberg.org

This Web site includes information about Project Gutenberg-tm, including how to make donations to the Project Gutenberg Literary Archive Foundation, how to help produce our new eBooks, and how to subscribe to our email newsletter to hear about new eBooks.